

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



2010

3

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №3 (185)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** sezonoj@kanet.ru

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2010**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo de la februara Ondo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 600 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №3 (185).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 22 февраля 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### *La perdita honoro de iu Gbeglo Koffi*

Lernejestro Gbeglo Koffi, eksa afrika emblemulo de UEA, bruligis unu ponton post alia en siaj rilatoj kun UEA kaj ties gvidantoj. Enigma silentanto inter la estraranoj, kiu sur kongresaj podioj impresis kiel kamparano abrupte ĵetita el vilaĝo al ĉefurbo, evoluis en laŭtan kriĉulon en movadaj retlistoj. Akklamata en 1998 kiel la unua afrikano, kiu iĝis estrarano de UEA — eĉ se nur por dormi en la kunsidoj de la ekzekutivo, laŭ Michela Lipari — li nun vekas malŝaton kaj ĉagrenon ĉe siaj iamaj apogantoj.

Kio misiris kun la togolandano? En si mem nenio eksterordinara okazis. La monda akلامo estas fragila kaj disflugema, kiel spertas ankaŭ la unua nigra ŝtatestro usona, sed ĝi ankaŭ facile blindigas kaj la apetito kreskas dummanĝe. Gbeglo Koffi iris longe de sukceso al alia. Elirinte el la estraro de UEA li trovis sin en la Akademio, ankaŭ tie la unua nigrulo. Pri lingvoscio li eĉ ne bezonas honti apud iuj kunakademianoj, ĉar almenaŭ akuzativon UEA bone plantis en Afriko. Sian ĉefan sukceson, starigon de propra lernejo en bela konstruaĵo, li tamen rikoltis ekstermovade, kvankam tio ne eblus sen lia bonŝanca kunvojaĝado en la movado. Al neniu alia afrikano la lernado de Esperanto alportis tiel grandiozan sukceson kaj materian prosperon. La lernejon UEA ne povos forpreni de li, sed ĝi restos lia ankaŭ, kiam la lasta unuamondano perdos paciencon pri li.

La kvinteseneco en la retaj litanioj de Koffi estas mono. Drolotita de UEA kiel la ĉefa afrikano, li abunde realigis la revon pri materia plibonfarto, kiun multaj afrikanoj flaras ĉe Esperanto. Kiam materiaj avantaĝoj estas la ĉefa antaŭenpelo, konkurado, envio kaj ĵaluzo fariĝas des pli krudaj, ju pli limigita estas ilia fonto, ĉi-kaze la poŝoj de UEA kaj de ĝiaj solidaraj kaj ofte naivaj membroj. Naivaj estis ankaŭ la gvidantoj de UEA, kiam por “afrikanigi” la gvidadon de la afrika agado ili fondis oficejon en Togolando, pli precize en la loĝejo de Koffi. Inter ĝiaj taskoj estis decidi pri la distribuo de subvencioj de UEA. Estis blinde ne vidi, ke tiu aranĝo favorus Koffi ankoraŭ pli ol li jam estis favorata kaj pli egaligus la afrikan agadon al togolanda agado. Baldaŭ oni rimarkis la eraron kaj decidis interveni submetante la oficejon rekte al la ĝenerala direktoro. Manke de detaloj ekstera observanto demandas sin, kial ne estis tiel dekomenca, ĉar tion ja preskribas pri la oficejoj de UEA ĝia statuto. Koffi rifuzis submetiĝi al Osmo Buller, kies reputacion li jam kiel estrarano provis subfosi per asertoj pri fraŭdecaj agoj kaj seksaj perversaĵoj, kun la sola rezulto detruiri sian propran reputacion. Post sia historia estraraniĝo la iama fieraja de UEA tiom marĝenigis sin per siaj aĉaj ĉikanajoj, ke lian nomon en analogoj savos nur forgeso de ĉio, kio okazis poste.

Koffi postulas Afrikon por afrikanoj. Postulante regon super sia helpmono UEA agas kiel ĉiu subvencianto, kiu disponigas sian monon por certaj celoj. Prave. Ankaŭ la mono verŝata al Afriko servu tion, kion la decidfarantoj de UEA juĝas utila al la monda movado.

**Komitatano Z**

**Sur la kovrilo** estas la legejo de la biblioteko de la Varsovia Universitato laŭ albumo el la jaro 1900. Supozeble ĉi tie iam estis ankaŭ Mark kaj Lazarj Zamenhof. Kion ili legis?..

# Mark Fabianoviĉ Zamenhof, instruisto en ŝtataj lernejoj

de Aleksander Korĵenkov

## I.

Laborante pri *Homarano*<sup>1</sup> mi devis retralegi la tutan disponeblan tekstaron pri la aŭtoro de Esperanto, kaj mi plurfoje kun mireto konstatis, ke multaj estimataj aŭtoroj ripetadis nepruvitajn informojn<sup>2</sup>, kiujn ili legis en la *Vivo de Zamenhof*<sup>3</sup> de Edmond Privat, verkita antaŭ 90 jaroj, kaj en aliaj verkoj malnovaj.

Ankaŭ mi trafis en similan kaptilon en la kazo de la patro de Zamenhof, tro fidinte al la menciita verko de Privat, kaj ankaŭ al *Doktoro kaj lingvo Esperanto*<sup>4</sup> de Adolf Holzhaus kaj al *La kaŝita vivo de Zamenhof*<sup>5</sup> de Naftali Zvi Maimon, kiuj enhavas priskribon de la vivo de Mark Fabianoviĉ Zamenhof.

Same kiel Zofia Banet-Fornalowa en *La familio Zamenhof*<sup>6</sup>, mi ripetis kelkajn faktojn kaj opiniojn, kiujn neniuj kontrolis. En ĉi tiu artikolo<sup>7</sup> mi tute ne intencas doni plenan biografion de M.F. Zamenhof, mi nur atentigos pri kelkaj kliŝaj eraroj kaj aldonos kelkajn novajn informojn. Sed en la dua eldono de *Homarano* mi reverkos la du komencajn ĉapitrojn *Vojaĝo inter la nomoj* kaj *La patro kaj la filo*.

## II.

Feliĉe, mi evitis la plej ripetadatan eraron pri la naskiĝo, kiun post Privat ĉiuj zamenhofologoj kaj enciklopediistoj lokis en Tykocin. Tio eĉ eterniĝis en Tykocin mem danke al la memortabulo, inaŭgurita en 1999 en la urbocentro (str. Piłsudskiego 25)<sup>8</sup>. Ne estas mirige, ke pri Tykocin, kiel la naskiĝurbo de M.F. Zamenhof, informas en la unuaj frazoj de siaj libroj Banet-Fornalowa<sup>9</sup> kaj André Cherpillod<sup>10</sup>, kaj ke UEA uzis la naskiĝon kaj la memortabulon por reklami la duontagan ekskurson “D2 Tykocin”<sup>11</sup> kadre de la



Mark Fabianoviĉ Zamenhof  
(1837–1907)

pasint-jara Universala Kongreso en Bjalistoko.

Ankaŭ mi intencis skribi tion en *Homarano*, sed antaŭ unu jaro, kiam mi estis en Bjalistoko, Zbigniew Romaniuk diris al mi, ke M.F. Zamenhof, laŭ liaj arkivaj esploroj, naskiĝis ne en Tykocin. Ĉar li ne volis malsekretigi la urbonomon ĝis eldono de sia monografio pri la Zamenhofa familio, reveninte hejmen (post laboro en arkivoj en Grodno kaj en Kaŭno) mi decidis serĉi tion en la reto.

En la retejo “Jewish Records Indexing — Poland”, kiu listigas pli ol 2.400.000 judajn registrojn, oni trovas plurajn Zamenhofajn familianojn. Tie estas notite, ke Motel Zaamenhof naskiĝis en Suwałki de la 30-jara patro Fajba Wolfowicz kaj la 28-jara patrino Rajna Percowna. La monografio de Romaniuk<sup>12</sup>, kies Esperanto-resumo aperis en *La Ondo de Esperanto*<sup>13</sup> dokumente konfirmis ĉi tion. Jam en *Homarano* kaj en *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda* de Romaniuk kaj Wiśniewski<sup>14</sup>, kiuj estis premiere prezentitaj en la Bjalistoka UK, oni povas legi, ke Mark


(aliaj nomformoj: Motel, Motl, Mordehaj, Mordka, Mordĥe, Markus) Zamenhof<sup>15</sup> naskiĝis la 27an de januaro 1837<sup>16</sup> en Suwałki.

Sed neniuj sukcesis elspuri, kiam Fabian (Ŝraga Fajvel, Fajvel, Fajvuŝ, Fajba, Fabijan) Zamenhof kun sia familio foriris el Suwałki (la lasta tiea dokumento estis datita je 1843) kaj ekloĝis en Tykocin (la unua dokumento datiĝas je 1853). Inter tiuj urboj povintus esti alia(j) loĝloko(j). Jehiel Miĥal Pines skribis, ke en la jaro 1849 en la urbeto Ruĵany en Grodna gubernio de Ruslando (nun en Bresta regiono de Belorusio) al li instruis la germanan lingvon la 12-jara Marko Zamenhof<sup>17</sup>. Sed laŭ Wajnsztejn<sup>18</sup>, Fabiano Zamenhof (en nekonata tempo) ekloĝis en Grodno kaj tie edukis Markon en la spirito de Haskala.

Danke al Maimon, Wajnsztejn kaj Romaniuk, ni scias pri la religia-kleriga agado de M.F. Zamenhof kunorganizinta, interalie, kun Eliezer Halberstam (1819–1899, poeto kaj bofilo de la industriisto Zabłudowski) modernan “korusan” sinagogon, ne akceptitan de la ortodoksa judaro. Maŝaton de la ortodoksaj judoj provokis ankaŭ la privata juda lernejo, fondita laŭ la ideoj de Haskala de M.F. Zamenhof, kiu laboris antaŭ tio kiel librotenisto kaj hejma lingvoinstruisto en la riĉa Bjalistoka familio Zabłudowski.

Poste, laŭ la legendo, M.F. Zamenhof instruis geografion kaj modernajn lingvojn en mezlernejo, do en la Bjalistoka gimnazio, kiu en 1872 iĝis reala lernejo. Kvankam lia nomo mankas inter la nomoj de la Bjalistokaj instruistoj en la *Memorlibroj* de la Grodna Gubernio por 1871 kaj 1872<sup>19</sup>, mi, post iom da hezito<sup>20</sup>, notis lian gimnazian instruistecon en *Homarano*. Eĉ pli, mi ripetis, laŭ la sama legendo, liajn postenojn Varsoviajn.

Sed mi malpravas.



En la Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (Sankt-Peterburgo) estas konservata formularo pri la ŝtatoficista kariero de Mark Fabianovič Zamenhof, kiu enhavas informojn pri liaj studoj kaj oficoj ĝis februaro 1883.

Г.	УІІ.	УІІІ.	ІХ.
1883	Где получил воспитание и окончил ли вы, заведяши какой курс науки, когда в службу вступали, каковы ваши обязанности, должности, чины, по которым служили, были ли какие-либо особенные по службе, чины или отчисления; не были ли особенно, кроме чина, чья награды, и в какое время; если что, если находите повод судить, для садоводства, быть, оправдан и притом ли виновным; то когда и за что именно были преданы суду и чьям делу подвергнуты.	Месяцы	и числа.
<p>Получил домашнее воспитание и, по выдержавши в 1878 году в Гродненской еврейской гимназии Комиссия Министерства на основании казенного еврейского училища, отправлен в службу в Гродненский еврейский язык и гимнастике в Гродно-Гродненский еврейский училище, по 160 руб. в год, в качестве учителя.</p> <p>Место года <u>Гродно</u></p> <p>Получил чин от службы. По выдержавши чин в 1878 г. в историко-филологическом факультете Минского университета Варшавского университета на основании, востановивши чин в Гродненском еврейском училище и в Гродненском еврейском училище.</p>		1866	1878

### III.

Jam post la eldono de *Homarano*, en oktobro 2009 mi iris al la Ruslanda Ŝtata Historia Arkivo (RGIA) en Peterburgo. Danke al la klasika studo<sup>21</sup> de la Peterburga historiisto Stepan Konstantinovič Ĥvorostin, ĉiuj intereso-atoj delonge scias, ke en RGIA estas pli ol cent dokumentaroj pri Esperanto. Sed por esplorado de ĉiuj priesperantaj dokumentoj al mi mankis tempo<sup>22</sup>, kaj mi elektis tiujn, kiujn neniam vidis Ĥvorostin (en la uzoslipo mankas lia nomo), sed kiujn jam traktis la konata Peterburga specialisto pri cenzuro Natalja Genriĥovna Patruševa, estro de la malnovlibra sekcio de la Ruslanda Nacia Biblioteko kaj kunkompilanto de la fundamenta konsultlibro *Cenzuristoj de Ruslanda Imperio*. Danke al ŝia afabla helpo, mi konsultis jenan dokumentaron (en la rusa lingvo *Delo*, t.e. *Afero*) pri la cenzuristo Mark Zamenhof<sup>23</sup>:

#### Afero

de la IIIa fako  
de la kancelario

de la ĉefa administrejo pri presaferoj

Pri allaso de la instruisto de la germana lingvo Zamenhof al laboro en la Varsovia Cenzura Komitato Komenciĝis la 7an de marto 1883 Finiĝis la 31an de oktobro 1888

Ĉi tiu *Afero* entenas 11 dokumentojn, inter kiuj la dua estas *Formulara listo pri la [ŝtata] servado de la instruisto de la germana lingvo de la Varsovia 1a Vira Progimnazio*<sup>24</sup> Mark Fabianovič Zamenhof, kompilita je la 25a de februaro 1883.<sup>25</sup>

Ĉi tiuj formularoj, kutime nomataj servolistoj (послужной список) estis uzataj por registrado de ĉiuj Ruslandaj ŝtatoficistoj ekde 1764 ĝis 1917. Ni vidu pli detale la servoliston de M.F. Zamenhof, kiu konsistas el ok grandaj paĝoj.

Post la titolpaĝo estas folioj kun 15 vertikalaj kolumnoj numeritaj roman-cifere.

En la Ia kolumno estas la ĉefaj personaĵoj: instruisto de la germana lingvo en la Varsovia 1a Vira Progimnazio Mark (li estas ankaŭ Motelj) Zamenhof, 44-jara<sup>26</sup>, hebrea religio, kavaliro de la ordeno de S-ta Stanislao de la 3a grado, salajro 450 rubloj jare,

en la VIIIa [ŝtatoficista] klaso laŭ sia ofico.

La Ila kolumno sciigas pri la deveno: urbano el Suvalkia gubernio.

La kolumnojn III-VI, dediĉitajn al registro de bienoj, traas la vorto “net” (ne estas).

La sekvaj tri kolumnoj prezentas la edukadon kaj karieron (VII studado kaj oficoj; VIII jaroj; IX monatoj kaj datoj). Ĉi tiu kolumnaro estas la plej grava por ni. Kompreneble, en la ŝtatoficista listo ne povas esti privataj okupoj, pro kiuj la ŝtato ne pagis salajron, ne donis ordenojn aŭ pensiojn. Do ekster la listo restas la librotenista, privatinstruista, pensionestra kaj eventualaj aliaj privataj laboroj de M.F. Zamenhof.

El la unua enskribo ni ekscias, ke li ricevis hejman edukadon kaj (jen la novaĵo por ni!) en 1858 plenumis en la Grodna gubernia instruista komisiono ekzamenon por la ofico de instruisto en ŝtata juda lernejo<sup>27</sup>.

Tiuj lernejoj (казённые еврейские училища) estis fonditaj en Ruslando, por ke la judoj povu ricevi ne nur la tradician religian, sed ankaŭ ĝeneralan kleron, kiu helpus al la judoj integriĝi en la socio. Sed, ricevinte la instrurajton, la 21-jara Motel ne rapidis instruistiĝi en tia lernejo, li preferis dediĉi sin al pli enspeziga privata entreprenado. Nur ok jarojn poste, la 3an de aprilo 1866, li eklaboris kiel instruisto de la rusa lingvo kaj aritmetiko en la 2a Bjalistoka juda lernejo. La salajro estis malgranda: nur 160 rubloj jare, sed, samtempe li plu laboris private. En la ŝtata juda lernejo li instruis ĝis la 5a de novembro 1873, kaj poste li demisiis el la ŝtata servo kaj kun la tuta familio iris al Varsovio. Aliajn ŝtatoficistajn postenojn li ne havis en Bjalistoko.

Ni devas konkludi, ke, mallaŭ la ĝisnunaj biografioj, Mark Zamenhof:

1. *neniam instruis en la Bjalistoka gimnazio, sed nur en la 2a Bjalistoka juda lernejo;*

2. *tie li instruis ne fremdajn lingvojn kaj geografion, sed la rusan lingvon kaj aritmetikon.*

### IV.

Privat, kiu verkis sian libron surbaze de interparoloj kun Lazarj Markovič Zamenhof kaj, post lia forpaso,

kun lia vidvino Klara Aleksandrovna, kaj uzis la familian arkivon, skribis pri M.F. Zamenhof:

En 1873 li transloĝis al Varsovio kun la tuta familio, kaj de tiam instruis la germanan lingvon ĉe Veterinara Instituto kaj Reala Gimnazio.<sup>28</sup>

Post 49 jaroj Holzhaus ŝanĝis de tiam al baldaŭ poste:

En decembro 1873 Marko transloĝiĝis Varsovion, kie li akceptis oficon de inspektoro de privata lernejo kaj baldaŭ poste li ricevis oficialan ŝtatan postenon. Li fariĝis instruisto de germana lingvo en Reala Lernejo.<sup>29</sup>

Simile skribis ankaŭ mi en *Homarano*, ankoraŭ ne leginte la XIIIan kolumnon de lia servolisto, kiu informas, ke dum preskaŭ du jaroj, ekde la 5a de novembro 1873 ĝis la 1a de septembro 1875, Mark Zamenhof estis ekster la ŝtata servado.

Li ne povus ekinstrui en mezlernejo, ĉar lia Grodna atesto, ricevita en 1858, permesis al li instrui nur en la elementaj lernejoj por judoj. Li do devis memstare pretiĝi al universitata ekzameno.

La kolumnoj VII–IX informas, ke en 1875 Mark Zamenhof sukcese ekzameniĝis en la historia-filologia fakultato de la Imperiestra Varsovia Universitato kaj danke al tio ricevis la rajton instrui la germanan lingvon en gimnazioj kaj progimnazioj de la Ministerio pri Popola Klerigado.

La 1an de septembro 1875 li eklaboris kiel instruisto de la germana lingvo en la Varsovia Veterinara Lernejo kun jarsalajro 180 rubloj.

Aldone, la 15an de aŭgusto 1877 li estis enoficigita kiel instruisto de la germana en la 2a klaso de la Varsovia Reala Lernejo kun jarsalajro 240 rubloj.

La 1an de februaro 1878 al liaj postenoj aldoniĝis tiu de ekstereta instruisto de la hebrea religio en la Varsovia 1a Vira Progimnazio kun jarsalajro 600 rubloj (lia plej alta salajro en la pritraktita periodo).

Mi dankas al Oksana Burkina, Roy McCoy, Natalja Patruŝeva kaj Josef Šemer pro la helpo en la pretiĝo de ĉi tiu studo.

La 1an de julio 1878 li krome iĝis instruisto de la germana en la Varsovia 4a Virina Gimnazio kun 280-rubla jarsalajro.

Lia suma ŝtata salajro fine de la 1870aj jaroj estis 1300 rubloj (iom pli ol 2500 francaj frankoj), aldoniĝis la kutimaj premioj. Ekster la ŝtata servo li tenis pensionon por judaj lernejoj, verkis lernolibrojn kiuj ofte reeldoniĝis, kaj supozeble havis aliajn enspezojn.

La 1an de julio 1881 oni dungis lin en la 1a Vira Progimnazio kiel instruiston de la germana lingvo kun 450-rubla jarsalajro; post kelkaj semajnoj, la 16an de aŭgusto 1881 li propravole eksiĝis el la posteno de la hebrea religia instruisto en ĉi tiu progimnazio.

En la unua tago de la sama 1881a jaro aperis la ukazo de la Imperiestro Aleksandro II, kiu pro la “perfekta kaj diligenta servado kaj pro specialaj klopodoj” donis al Mark Fabianoviĉ Zamenhof la ordenon de S-ta Stanislaŭ de la 3a grado.

La servolisto ankaŭ konstatas, ke li (X) ne partoprenis en militaj kampanjoj, (XI) ne estis monpunita, enketita, juĝita, kaj (XII) ne havis libertempon (temas pri manko de ekstra libertempo dum ofica periodo, ne pri la dujara eksiĝinteco).

## V.

En la XIVa kolumno estas skribite, ke li estas edziĝinta kun filino de la bjalistokano Ŝolem Sofer, kaj ke la geedzoj havas kvin filojn (kun la Esperantaj nomformoj kaj kun la naskiĝdatoj):

- Lazarj (Ludoviko), 3 dec 1859,
  - Fabijan (Felikso), 25 okt 1868,
  - Grigorij (Henriko), 24 sep 1871,
  - Lev (Leono), 19 okt 1875,
  - Aleksandr (Aleksandro), 31 [la monato apenaŭ legeblas, sed verŝajne estas oktobro. – A.K.] 1877;
- kaj tri filinojn:
- Fanna<sup>30</sup> (Fania), 31 mar 1862,
  - Avgustina (Aŭgusta), 12 aŭg 1864,
  - Ida (Ida), 4 okt 1879.

Ĉi tiu listo kun la precizaj nomoj kaj naskiĝdatoj de la infanoj de Mark kaj Liba Zamenhof estas la plej plena inter la ĝis nun publikigitaj.

Wiesenfeld<sup>31</sup>, Cherpillod kaj Banet-Fornalova ne konis aŭ ne indikis la naskiĝdatojn, sed nur la jarojn, nek donis ĉiujn oficialajn nomojn; kaj Romaniuk ne priskribis la Varsovian periodon de la Zamenhofa familio.

La XVa kolumno, rezervita al specialaj notoj, restis malplena.

## VI.

La lasta enskribo en la servolisto estis farita en aŭgusto 1881. Ni ne scias fidinde lian pluan instruistan karieron. Sed laŭ lia letero<sup>32</sup> al la estro de la Ĉefa administrejo pri presferoj, kiun ni detale traktos en la dua parto de ĉi tiu artikolo, estas konate, ke je la 31a de oktobro 1888 li ne plu instruis la germanan en la 1a progimnazio, sed plu instruis ĝin en la reala lernejo (aliajn lernejojn li ne menciis).

La postenon en la reala lernejo li konservis longe.

Unu jaron poste, en decembro 1889 kaj en januaro 1890, en la Varsovia hebrealingva gazeto *Hacefira* (Haze-firah), kiun li cenzuris dum kelkaj jaroj, plurfoje aperis en la jida (ne en la hebrea!) lingvo lia anonco kun mencio de la ŝtatlerneja instruisteco:

מ. פ. זאמענהאָף  
לעהרער ידער דייטשען שפראכע  
אין דער ווארשויער רעגירונג  
רעאלשולע, ניםמט אן קנאכען אין  
פענסיאן. ווארשויא, נאוואליפקי 42.

M.F. ZAMENHOF.

Instruisto de la germana lingvo en la Varsovia ŝtata reala lernejo, akceptas knabojn al pensiono. Varsovio, Nowolipki 42.<sup>33</sup>

Post unu plia jaro en la *Adreso-Kalendaro* (la ĝenerala listo de ĉiuj ŝtatoficistoj en Ruslanda Imperio) por 1891 Mark Fabianoviĉ Zamenhof estas menciita kiel unu el la tri instruistoj de la germana lingvo en la Varsovia Reala Lernejo<sup>34</sup>. Li estas registrita en la sama instruista posteno ankaŭ en la postaj eldonoj de ĉi tiu jarlibro ĝis inkluzive 1898<sup>35</sup>.

Kiel Ruslanda ŝtata oficisto, Mark Fabianoviĉ Zamenhof realigis sin ne nur en la Ministerio pri Popola Klerigado, sed ankaŭ en la Ministerio pri Internaj Aferoj.

Pri tio legu en la venonta *Ondo*.

## Referencoj kaj notoj

1. Korĵenkov A. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009.

2. Ekzemple, mi jam skribis, ke estas preskaŭ nekredeble, ke dum cento da jaroj esperantistoj uzadis fantaziajn statistikojn pri la loĝantaro de Bjalistoko, kaj ilin resumis Bernard Golden (*Sennacieca Revuo*, 1991, №119, p. 32–36), sed neniu el ili konsultis la oficialan rezulton de la unua Ruslanda censo, kiu unuafoje aperis en Esperanto nur en *Homarano*.

3. Privat E. *Vivo de Zamenhof*. 6a eld. Rotterdam: UEA, 2007. (Efektive, ĉi tiu eldono estas ne la sesa, sed la sepa.)

4. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1969.

5. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1978.

6. Banet-Fornalowa Z. *La familio Zamenhof*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2000.

7. Mi verkis ĝin kiel la unuan el miaj tri prelegoj por la Zamenhofologia Monatfino de KCE (30–31 jan 2010, La Chaux-de-Fonds), kiun mi ne povis partopreni pro vizomanko. La spuroj de la prelegeco (eŭfemismo por “babileco”) neeviteble markas ĉi tiun tekston.

8. Kamiński R. *Pola listo de Zamenhof/Esperanto-Objektoj (ZEO)*. Lodzo: Pola Esperanto-Asocio. Filio en Lodzo, 2003, p. 8.

9. Banet-Fornalowa Z. *La familio Zamenhof*, p. 15.

10. Cherpillod A. *L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj*. Courgenard: La aŭtoro, 1997, p. 3.

11. *Dua Bulteno*: 94-a Universala Kongreso de Esperanto. Bjalistoko, 25 julio – 1 aŭgusto 2009. [Rotterdam]: [UEA], [2009], p. 24.

12. Romaniuk Z. *Zamenhofowie w drodze do i w Białymstoku*. Brańsk: La aŭtoro, 2009.

13. Romaniuk Z. *Zamenhofoj survoje al Bjalistoko kaj en la urbo* / Trad. el la pola Przemysław Wierzbowski // *La Ondo de Esperanto*, 2009, №7, p. 14–15.

14. Romaniuk Z., Wiśniewski T. *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda: Pri Ludoviko Zamenhof, lia familio kaj la komenco de Esperanto = Zaczęło się na Zielonej: O Ludwiku Zamenhofie, jego rodzinie i początkach esperanta*: En Esperanto kaj en la pola / Trad. el la pola Przemysław Wierzbowski. Łódź: Księży Młyn, 2009.

15. En la 16a paĝo de *Zamenhofowie...* Romaniuk prezentas liston kun dek malsamaj formoj de la familia nomo en la latina skribo, kvar formoj cirilaj, kaj du formoj en la du judaj lingvoj.



Kelkajn tagojn antaŭ la fino de la 2009a jaro *Sezonoj* vendis la lastan ekzempleron de *Homarano* el sia stoko.

La libroservo de UEA kaj kelkaj aliaj esperantistaj libroservoj ankoraŭ havas ekzemplerojn de la plej nova biografio de Zamenhof.

La aŭtoro de *Homarano* atendas korektojn, aldonojn kaj aliajn komentojn, kiuj estos konsideritaj en la iam aperonta dua eldono.

16. Ĉiuj datoj estas donitaj laŭ la Julia Kalendaro; aldonu 12 tagojn (13 en la 20a kaj 21a jarcentoj) por havi la saman daton Gregorie.

17. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*, p.28–29.

18. Wajnsztejn Z. *Największy syn Białegostoku // Reflektor*, 1931, №29, p. 3. — Ĝi estas koncizigita versio de la artikolo de Wajnsztejn el *Polska Wolność* (1931, №33), kiun mi ankoraŭ ne sukcesis trovi.

19. *Памятная книжка Гродненской губернии на 1871 год (Адрес-календарь)*. Гродно, 1871. *Памятная книжка Гродненской губернии на 1872 год (Адрес-календарь)*. Гродно, 1872.

20. Mi hezitis, ĉar Maimon, priskribante la ĉefparoladon de “la klera instruisto Mordeĥaj Zamenhof” en la inaŭguro de la nova sinagogo en Bjalistoko (laŭ la Vilna hebrea gazeto *Hakarmel*), menciis, ke li estis ne nur kunfondinto de la sinagogo, sed ke li estis verŝajne ankaŭ instruisto en la “registara lernejo por hebreaj infanoj” en la malsupra etaĝo de la sinagogo (*La kaŝita vivo de Zamenhof*, p. 30–32). Sed pro la vorto *verŝajne* mi decidis ne mencii tion en *Homarano*.

21. Ĥvorostin S. *Cara cenzo kaj Esperanto // Sciencia Revuo*, 1972, №1-2, p. 37–46; №3, p. 79–88.

22. En RGIA la esploranto devas atendi tri labortagojn ĝis ricevi ne pli ol tri “aferojn” (en la formo de paperujo aŭ mikrofilmo) en unu tago. Do, dum tri labortagoj (inter kiuj enmetiĝis du ekstraj semajnfinaĵoj) mi atendis la dokumentojn kaj prizorgis aliajn aferojn, kaj dum la du sekvintaj labortagoj mi esploris nur ses dokumentujojn. Nur 15 dokumentujojn dum la semajno oni povas trakti, kaj do necesus almenaŭ ok semajnoj por la tuto: neebla periodo por la redaktoro de monata gazeto.

23. РГИА, Ф. 776, оп. 20, д. 582.

24. Progimnazioj, establitaj en Ruslando en 1864, instruis laŭ la programo de la unuaj kvar gimnaziaj klasoj.

25. РГИА, Ф. 776, оп. 20, д. 582, л. 3–7.

26. Ĉi tiu listo estas kopiita el la originalo, en kiu la lasta enskribo estis farita en 1881, kiam li estis efektive 44-jara. La kopiantoj en 1883 reskribis sen korekti, kaj la kompilantoj de la konsultlibro *Cenzuristoj de Ruslanda Imperio* matematike indikis 1839 kiel la naskiĝjaron de M.F. Zamenhof. Sed mi jam donis al ili la ĝustajn informojn.

27. Pli ĝustaj formoj estus: porjuda lernejo (aŭ, lernejo por judoj), porknaba/porknabina gimnazio k.s., sed ni uzas la pli tradiciajn tradukojn el la rusa: juda lernejo, vira/virina gimnazio.

28. Privat E. *Vivo de Zamenhof*, p. 26.

29. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, p. 7, 10.

30. Ŝi (jide: Fejgla) evidente devus havi en la rusa la nomon Faina, ne Fanna. Ĉu la kopiisto eraris? Tio okazas, rememoru la anekdoton pri la deveno de la familinomo Zilbernik.

31. Wiesenfeld E. *Galerio de Zamenhofoj*. Horrem bei Köln: Heroldo de Esperanto, 1925.

32. РГИА, Ф. 776, оп. 20, д. 582, л. 16–17.

33. *Hacefira*, 10 (22) dec 1889, p. 4, k.a. Tradukis Josef Ŝemer. Legebla rete: <http://www.jnul.huji.ac.il/dl/newspapers/hazefirah/html/hazefirah-18891222.htm>

34. *Адрес-календарь: Общая роспись начальствующих и прочих должностных лиц по всем управлениям в Российской Империи на 1891 год*. Ч. II. Власти и места центрального управления и ведомства их. СПб.: Типография Правительствующего Сената, 1891, с. 474.

35. Oksana Burkina trovis menciojn pri M.F. Zamenhof en ĉiuj eldonoj de la *Adreso-Kalendaro* ekde 1892 ĝis 1898.

## Aŭspicioj al ARKONES kaj BET

Du prestiĝaj Esperanto-aranĝoj, ambaŭ kun longa tradicio, ricevis aŭspiciojn de UEA por ilia ĉi-jara okazigo. La Estraro de UEA donis tiun specialan statuson al la 46aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en la litovia urbo Visaginas (26 jun – 4 jul) kaj al la 26a ARKONES en la polanda urbo Poznano (24–26 sep).

La tradicio de Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) naskiĝis kiel Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro en 1959 kaj daŭras ekde tiam ĉiujare, escepte de du paŭzoj. Komence la partoprenantoj venis el la baltaj respublikoj, sed baldaŭ el la tuta tiama Sovetunio. Post la resendependiĝo de la baltaj ŝtatoj BET evoluis al vere internacia renkontiĝo kun riĉa programo. Al BET-46 oni atendas ĉ. 300 personojn el trideko da landoj.

Legu pli: [www.esperanto.lt/](http://www.esperanto.lt/)

ARKONES, t.e. ARTaj KONfrontoj en ESperanto, ĝuas la aŭspiciojn de UEA la kvaran fojon. De kelkaj jaroj ĉi tiu arta kaj kleriga aranĝo okazas lige kun la aŭtuna studsesio de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz, kies studentoj kaj instruistoj formas parton de la averaĝe 200-kapa publiko kaj ankaŭ kontribuas al la programo. Ankaŭ pluraj funkciuloj de UEA prelegis en ARKONES, i.a. prezidento Probal Dasgupta pasintjare.

Legu pli: [www.arkones.org/](http://www.arkones.org/)


GK UEA

## Diplomoj pro fidela membreco

Fine de januaro la Centra Oficejo de UEA ekspedis la lastajn diplomojn al tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj ĝis la pasinta jaro membris en la Asocio minimume 40 aŭ 50 jarojn. Ĉiuj diplomoj estis subskribitaj de la Prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta. Tiu rekono de fidela membreco estis enkondukita pasintjare kaj la unuaj diplomoj estis disdonitaj en la Universala Kongreso en Bjalistoko. Entute 186 membroj ricevis la honorigon pro 50-jara membreco, dum 259 membroj estis diplomitaj pro 40-jara membreco. Sekve 445 membroj, t.e. 7,8% el ĉiuj individuaj membroj de UEA, apartenas al sia Asocio jam almenaŭ 40 jarojn.

La unua disdono de diplomoj okazos ĉiam en la Universala Kongreso, post kiu la neĉeestintoj ricevos sian diplomon poŝte aŭ eventuale en la Malferma Tago de la CO aŭ alia taŭga okazo.

GK UEA



## Utopio en kvar movadoj

En la usona filmfestivalo *Sundance* okazis fine de januaro la premiero de la filmo *Utopia in four movements* de reĝisoro Sam Green. La titolo de la filmo (“Utopio en kvar movimentoj” aŭ “Utopio en kvar movadoj”) referencas al la tradicia konstruo de simfonio kaj al sociaj movadoj. Unu el la movadoj estas la esperantista, kiun Sam Green observis kaj filmis i.a. en kongreso de la usona landa asocio ELNA kaj en la Universaliaj Kongresoj en Florenco, Jokohamo kaj Roterdamo. La nuna tempo estas laŭ Green malamika al utopioj, sed malgraŭ tio diversaj idealistoj plu persistas, ne perdante siajn idealojn, kaj la simpatio de la reĝisoro estas ĉe ili.



Sam Green estas renoma kinisto, kies dokumenta filmo *The Weather Underground* (2003) pri la tiunoma radikala usona movado en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj estis nomumita por Oskaro. Multaj esperantistoj helpis al Green en diversaj stadioj de la estiĝo de lia nova verko. Li ricevis asiston i.a. de ELNA kaj ESF. La Centran Oficejon de UEA li unuafoje kontaktis fine de 2005. Dum la Internacia Filmfestivalo de Roterdamo en januaro 2006 Green vizitis la Centran Oficejon por esplori en la Biblioteko Hodler kaj por prepari ĉeeston de sia skipo en UKoj.

GK UEA



## Konstrui vilaĝon en Makambo

*AmaHoro* estas projekto por konstrui vilaĝon kun transnacia, filantropa kaj pacifisma alvokiĝo, sub la aŭspicio de la Esperanta Civito, sur la tereno donacita de la Burundia ŝtato en la suda provinco Makambo.

La prezidanto de la Societo Internacia por Paco Universala (SIPU) kaj la Konsulo de la Esperanta Civito elektis la Konsilion de *AmaHoro*: ĝiaj anoj estas Martin Mbazumutima, Libère Mudende, Chamberline Nguetack, Frédéric Nimubona, Salvator Nizigiymana.

Martin Mbazumutima estas deputito de la Parlamento, kaj pli frue unu el la estroj de la kabineto de la nuna prezidento. Libère Mudende laboras en la Ministerio pri ercoj kaj geologio. Chamberline Nguetack estas Civita vickonsulo pri la tria mondo kaj socialaj aferoj. Frédéric Nimubona prezidas la Societon Internacian por Paco Universala. Salvator Nizigiymana estas la ĝenerala direktoro de la Burundia nacia telefonkompanio.

En sia unua kunsido (5 feb 2010) la Konsilio elektis Martin Mbazumutima kiel prezidanton, kaj Libère Mudende kiel vicprezidanton. Krome Frédéric Nimubona estis elektita kiel surloka referenculo pri financoj. Fine, Jérôme Niyokindi kaj Ildéphonse Bizindavyi estas indikitaj kiel asistaj arkitektoj por Claude Bensimon, kunlaboranto de la regio *Pro Esperanto*.

La Konsilio ekzamenis la proponojn de kunlaboro kun Internacia Civila Servo kaj kun pastro Duilio Magnani.

HeKo

## 12 komitatanoj B proponitaj

Du semajnojn antaŭ la limdato 12 membroj estas kandidatigitaj por konkursi pri la ses lokoj de Komitatanoj B en la supera organo de UEA. Sep kandidatoj jam havas la minimumon de dek subtenantoj el tri landoj, dum la aliaj kandidatoj ankoraŭ devos kompletigi siajn dosierojn ĝis 28 feb 2010. Dum la restanta periodo povos aldoniĝi aliaj kandidatoj.

La entuziasmo estas tiom pli rimarkinda, ĉar en la antaŭa fojo en 2007 balotado ne necesis, sed ĉiuj kandidatoj elektigis aŭtomate. Ne nur ne estis pli da kandidatoj ol la tiam disponeblaj sep lokoj, sed du lokoj restis vakaj, ĉar aperis nur kvin validaj kandidatoj.

GK UEA

## Novzelandanoj kongresis

La kongreso de NZEA okazis en la studentejo *Weir House* en la ĉefurbo Wellington dum la lasta semajno de januaro.

En la jarkunveno de NZEA reelektiĝis la sama Estraro kiel en 2009. En aparta sesio, membroj kontribuis al diskuto pri planado kaj strategio. La movado en Nov-Zelando ankoraŭ vivas sed mankas novaj volontuloj. NZEA havas novajn membrojn sed neniu el ili partoprenis la ĉi-jaran kongreson.

La ĉefa instruisto por la lingvaj sesioj estis Sabine Trenner el Germanio. Ŝi parolis pri verkado de rakontoj, kaj instigis la ĉeestantojn verki. Post individuaj laboro ĉiu prezentis siajn diversajn rakontojn, el kiuj kelkaj aperos poste en *Esperanto sub la Suda Kruco*. Donald Rogers gvidis sesion pri gramatiko, vortelektado kaj stilo en Esperanto. Kongresanoj demandis pri diversaj punktoj, kaj Donald provis klarigi.

Jakobo Schwartz parolis pri la movado en Usono kaj diris ke multaj ne-Esperantistoj ne konstatastas ke ili havas problemon pri lingvoj; tial ili ne konscias ke Esperanto estas solvo. En sia dua parolo Jakobo parolis pri sia hobbio: trikado.

Donald Rogers parolis pri ĝardenado kaj pri la Esperanto Vikipedio. Tonny Jansen rakontis pri sia porpaca varbado. Ŝi tradukis flugfolion de kontraŭmilita pacgrupo *Pax Animi* en Esperanton. Gwenda Sutton raportis pri sia provo atentigi homojn pri Esperanto en la tiel nomata 4a Parlamento de Mondaj Religioj kiun ŝi ĉeestis en Melburno en decembro 2009.

Okazis kelkaj aliaj prelegoj. Bradley McDonald parolis pri la Universala Kongreso en Bjalistoko, kie li ĉeestis la kunvenojn de la Komitato de UEA. Li ĉeestis la akcepton de la urbestro de Bjalistoko (li eĉ portis tajloritan kompletan por la okazo) kaj fieris ke la urbestro bone parolis Esperanton. Li konstatis ke Bjalistoko fieras pri Zamenhof kaj ke Esperanto penetris la urbon.

En la distra parto Erin McGifford prezentis teatraĵeton pri tempomaŝino kaj parolis pri diversaj temoj, inkluzive de sia ideo por ke katoj lernu Esperanton! Donald Rogers priparolis kriketon, post kiu la kongresanoj iris al apuda kriketa ludejo por ludi kriketon. Por la kongresa bankedo, ĉiuj iris al tajlanda restoracio.

David Ryan

## Jes al JES!

Je la jarŝanĝo, inter la 26a de decembro 2009 kaj la 3a de januaro 2010, en la montara urbo Zakopane, Pollando, okazis la unua Junulara Esperanto-Semajno (JES) — kuna iniciato de *Varsovia Vento*, GEJ kaj PEJ.

Malgraŭ la fakto, ke JES en la aranĝa kalendaro aperis nur la unuan fojon, ĝi sukcesis kolekti pli ol ducent partoprenantojn el Eŭropo kaj el kelkaj ekster-eŭropaj landoj. La interesiĝo pri la evento venis pro la unuiĝo de la Ago-Semajno (AS) kaj la Internacia Seminario (IS). Dum la 64a IJK en Hungario la organizantoj de ĉi tiuj tradiciaj novjarfestaj renkontiĝoj interkonsentis respondi al deziroj de siaj partoprenantoj kaj el la du plej grandaj kaj popularaj vintre junularaj eventoj krei nur unu. La reago de la esperantista junularo estis antaŭvidebla. Preskaŭ ĉiuj entuziasme kaj unuvoĉe ekkriis: JES!

Ekde la komenco la organiza teamo, konsistanta el poloj kaj germanoj, ŝatis krei aranĝon tute novan ne nur pro la nomo.

La ĝisnunaj skemoj de AS kaj IS miksiĝis por atingi iel freŝan kaj eksterordinaran rezulton. Por krei neforgesblan etoson estis luita nur unu ejo, en kiu ĉiuj povis esti kune. Tute nekutime prezentiĝis ankaŭ la programo. Estis tri busaj ekskursoj, sed ne unu; eĉ la manĝo-tempoj sekvis en nekutimaj ĝis nun horoj. Kompreneble ne ĉiuj akceptis la ŝanĝojn entuziasme. Tamen, spite al ia malkomforto loĝi en grandaj ĉambroj, plej multaj en la nova realeco trovis sin kvazaŭ kiel fiŝoj en la akvo.



La kuneco tuj vekis eksterordinare bonegan etoson, kiu respegulis la plej bonajn impresojn de la koridora ludo dum iu ajn esperantista aranĝo. Fakte JES estis absolute koridora. Malgraŭ apartaj ejoj por la programeroj la festo daŭris ekde la komenco ĝis la fino en ampleksaj koridoroj de la ejo, kiuj transformiĝis en kafejojn, kantejojn, dancujojn, eĉ oficialajn kaj neoficialajn koncertlokojn.

Ankaŭ programe la nova aranĝo



JES en Zakopane estis gaja: Małgorzata Gońska Baczyńska, Dorota Rodzianko, Aurelian Jurkiewicz, Domian Marta (Foto el la albumo *JES 2009/10* de Dorota Rodzianko en Facebook)

evidentiĝis impone sukcesa. Prezentiĝis sin muzike (oficiale kaj neoficiale) Ĵomart kaj Nataŝa kun Karina, Georgo Handzlik, Kim J. Henriksen (*Hotel Esperanto*), Pafklik — Platano kun Emĉjo, Éric Languillat, Gijom Armide kaj Johannes Mueller. Neoficiale koncertis ankaŭ Tifen el Francio kaj Aleksandr Hrustalov kun Tanjo. JES eniris la historion ankaŭ pro la teatra aktiveco. Apud spektakloj de la Esperanto-Studio *Improvizo*, kiu prezentis elektitajn dramojn de Anton Ĉeĥov, sursceneje Georgo Handzlik ludis la rolon de Doktoro Esperanto; impresdonan surscenigon proponis ankaŭ gejunuloj el la moskva klubo MASI.

Kompreneble, en la programo de JES ne mankis prelegoj pri diversaj temoj kaj prezentadoj de esperantistaj eventoj. Apud la ekskursoj en la urbo kaj en la proksima belega Tatra montaro, estis organizitaj diversformaj trejnadaj. Inter ili valoras menciigi lernadon de la pentrado kaj skulptado en la loka arta lernejo kaj trejnadon de ĵurnalismo por la redakcio de la podkasta radio *Varsovia Vento-Elsendoj*.

La unua ne signifas la lasta. Laŭ interkonsento de la pola kaj germana junularo la dua JES okazos en Germanio. En momento, en kiu vi legas ĉi tiun artikolon, la organiza teamo probable elektis jam lokon de la dua renkontiĝo kaj kune, pro la internacieco pere de la retaj rimedoj, komencas prepari la aranĝon.

Pli multe da informoj vi trovos ĉe la paĝo de JES, [www.jes.pej.pl](http://www.jes.pej.pl), en kiu vi trovos ankaŭ la retan aliĝilon. Bonvenon al la dua JES!

Nome de la organiza teamo,  
**Arkadiusz Zychewicz, Małgorzata Baczyńska, Irek Bobrzak**



## Subteno el Britio

(**Landa Agado**). Ok britaj parlamentanoj skribe nomumis la Universalan Esperanto-Asocion kandidato por la Pac-premio Nobel en 2010. Jen iliaj nomoj kaj iliaj partioj:

Andrew Smith (Laborista), Austin Mitchell (Laborista), Bill Etherington (Laborista), Oliver Heald (Konservativa), Charles Kennedy (Liberal-demokrata), Lord Bob Maclennan (Liberal-demokrata), Lord Robin Corbett (Laborista), Roger Gale (Konservativa).

**Renato Corsetti**

## Flandra kazo provizore fermita

Rilate la kazon Petro Desmet', Komitato Armand (pri esperantistoj en prizono) informas ke 12 okt 2009 flandra tribunalo verdiktis en unua grado pri la akuzoj kontraŭ la konata esperantisto, nun 75-jara, kiu deklaris sin senkulpa.

La tribunalo juĝis ke "konsiderante la diversajn raportojn de la kuracisto-specialisto Dr. Deberdt, kiu ankaŭ esploris la medicinajn dosierojn de f-ino Elina B. mem, oni ne povas pridubi la fakton ke la imputito en la periodo de 1.1.1992 ĝis 1.4.1996 kulpas la fifaktojn pri kiuj oni akuzas lin".

Konsekvence Desmet' estis kondamnita je trijara karcerpuno, plus monpuno kaj pago de la proceskostoj. La kondamno estas sub kondiĉa suspendo dum kvin jaroj. La kondamnito tuj apelaciis kontraŭ la verdikto. Ĉar la apelacio aŭtomate prokrastas la punon, ĝis la definitiva duagrada verdikto, kaj ĉiukaze Desmet' ne estas enprizonigita, Komitato Armand provizore fermas la dosieron.

**HeKo**

## ABeE resumas kaj planas

24 jan 2010 kunsidis en Lokossa la Estraro de la Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE). La estraro analizis la ricevitajn klubraportojn (11) kaj resumis ilin en sia ĝenerala agadraporto.

En 2009 ABeE sekve de la rajtigo, kiun ĝi akiris de la edukaj aŭtoritatoj, enkondukis Esperanton en tri ŝtataj mezlernejoj: mezlernejo №3 en Lokossa, duagrada lernejo №2 en Klouekanme, kaj mezgrada lernejo de Dedekpoe. Al la kursoj aliĝis 82 lernejanoj.

ABeE planas aliĝi al la landa Unesko-sekcio. Krome, ĝi decidis organizi ekzamenojn ĉe la tri elektitaj lernejoj.

**Latifou Gbadamassi,**  
**Pierre Houenavo**

## BEL-Konferenco tradiciiĝas

70 personoj aktive partoprenis en Piracicaba la trian okazigon de BEL-Konferenco, aŭspiciata de la Brazila Esperanto-Ligo.

Klare montriĝas, ke la publiko bone komprenas ĝiajn celojn: kleriĝo, amika diskutado pri niaj kulturo kaj movado kaj serioza serĉado de novaj vojoj por nia afero — ĉio en tre agrabla etoso, sen samtempaj programeroj kaj kun abunda koridora babilado.

Dum la karnavalaj dimanĉo (14 feb) kaj lundmateno (15 feb) oni aŭskultis kaj diskutis (foje en laborgrupetoj) pri "Kontaktoj de BEL ĉe universitata, politika kaj diplomata medioj" (J. Passini), "Esperanto-instruado kaj Esperanto-edukado" (D. Bianchini), "Dedukto el du frazoj" (G. Mattos), "Instruado de Esperanto en Brazilo — nuna stato kaj perspektivoj" (J. Barbosa kaj P. Nascen-tes), "La decido eduki dulingvajn infanojn kaj nia familia sperto pri denaska Esperanto" (Isis kaj James Piton). Bedaŭrinde, Prof. José Leite Jr. el Fortaleza ne povis ĉeesti por prezenti sian studon. Ĉiu partoprenanto ricevis kajeron kun la resumoj de la prelegoj; interesatoj povas peti ĝin rete.

La evento okazis en la katolika seminario *S. Fidelis*, kiu proponis tre komfortajn ĉambrojn por tranoktado, manĝado kaj laborado. Dum la tagmanĝa paŭzo junula blovorkestro el la najbara urbo Charqueada prezentis belegajn muzikaĵojn, kiuj ravis la publikon. Pluraj samideanoj proponis, ke ili sin prezentu ankaŭ en la Brazila Esperanto-Kongreso. La loka ĵurnalo informis pri la evento.

Brazila Esperanto-Ligo varme dankas la laborgrupon en Piracicaba kaj Charqueada (*vidu la suban foton*), kiu multe strebis kaj atingis senriproĉan rezulton, sub la entuziasma kaj entuziasmiga gvidado de la nelacigebla Guilherme Jardim.

**Paulo Sérgio Viana**



*Eventoj*

## Poznano: la kvara sesio

La kuna organizo de interlingvistika sesio kaj de instruista trejnado en la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) portis bonajn rezultojn dum la vintra sesio (30 jan – 5 feb 2010). La universitata grupo travivis sian kvaran semestron profunde studante lingvistikajn aspektojn de Esperanto: ili konatiĝis kun diversaj terenoj de aplikata lingvistiko (de leksikografio tra lingva seksismo ĝis komputa lingvistiko) kaj pragmatiko (de komunikado kaj ĝentilecformoj en diversaj sociaj kaj kulturaj cirkonstancoj ĝis lingva bildo de la mondo) kun Ilona Koutny. La gramatika kurso de prof. Sabine Fiedler interese traktis interalie la esperantan frazeologion. D-ro Ziko van Dijk analizis la problemojn de Esperanto-movado kaj UEA.

La lastajn du kursojn povis sperti ankaŭ la partoprenantoj de la instruista trejnado, kiuj cetere senlace laboris pri metodikaj taskoj kaj rilataj problemoj kun d-ino Katalin Kováts kaj Ilona Koutny, ili prezentis siajn modellecionojn kaj instruistajn kofrojn.

La tradicia komuna vespero komenciĝis per prelego de prof. Remigiusz Mielcarek pri la indonezia lingvo, post kantoj de la tri hungaraj instruistinoj sekvis kataluna sorĉado, kaj fine Zuzanna Kornicka kantis gitarludante. Post la sesio interesigantoj veturis al Malbork spitante la malvarmon por vidi la kavalaran kastelon kaj la Parkon de la Mondo.

**Ilona Koutny**

## Ĉu lastafoje en Stokholmo?

En januaro komenciĝis ĉe la Stokholma universitato la kurso "Enkonduko al Esperanto" (7,5 Bolonjaj poentoj). Aliĝis 35. Kelkaj poste skribis, ke ili ne povos sekvi la kurson. Inter la kursanoj estas esperantistoj, kiuj volas simple subteni la kurson.

La kurso estas tute distanca, sed estos kelkaj dialogekzercoj per Skype kaj la buŝa parto de la ekzameno okazos telefone. Mi estas instruisto/kunordiganto de la kurso.

Se multaj trauros tiun kurson kaj poste aliĝos al la kurso "Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj" (7,5 poentoj), ĝi okazos en la dua duono de la semestro.

Ĉar profesoro Hartmut Traunmüller, respondeca pri la kursoj, ĵus emeritiĝis, povas esti ke ĉi tiu estas la lasta fojo kiam Esperanto estas instruata ĉe la Stokholma universitato.

**Hokan Lundberg**



**Sur la supra foto:** Max Kašparů (maldekstre) tostas je sukceso de la nova kvarlingva libro (ĉeĥa-Esperanta-anglagermana) de Pavel Rak *Desegnita humuro* kun la eldonisto Petro Chrdle (meze) kaj la aŭtoro Pavel Rak. (Fotis Eva Gorgolová)

## Esperanto, ĉu prevento kontraŭ la Alzheimer-malsano?

Max Kašparů, konata ĉeĥa psiĥiatrio kaj teologo, antaŭ kelkaj monatoj komencis lerni Esperanton, kaj jam li sukcesis tre efike ĝin propagandi.

Kiam li estis invitita en la tutŝtatan radiostacion *Ĉeĥa radio 2 — Prago* por diskuti kun la aŭskultantoj pri la Alzheimer-malsano, unu el la demandoj estis: “Ĉu vi povas konsili al ni, kia estas la plej efika prevento kontraŭ Alzheimer-malsano?”

Lia respondo post la unuaj kutimaj vortoj fariĝis pozitiva ŝoko por ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj: li diris, ke ĉefe oni ne lasu maldiligenti sian cerbon. Kaj kiel plej taŭgan rimedon por tio li konsilis la lernadon de la internacia lingvo Esperanto. Ĝi estas laŭ li logika mozaiko, kiun oni kunmetas por esprimi siajn ideojn, kaj dume oni efike kaj tamen ne komplike ekzercas la cerbon. Kaj Esperanto havas laŭ Kašparů ankaŭ la kroman efikon, ke ĝi pliriĉigas la socian vivon de la lernantoj per trovo de novaj amikoj eĉ eksterlande, kio estas por pliaĝaj homoj ankaŭ tre grava.

Mi aldonu, ke d-ro Kašparů tre rapide progresas en siaj konoj de Esperanto (verŝajne ankaŭ li sentas la bezonon de la menciita prevento kontraŭ la Alzheimer-malsano), kaj por lerni li uzis tre efikan kaj samtempe utilan rimedon: li ĵus fintradukis la lernolibron de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo* el la slovaka ĉeĥen. Lia traduko baldaŭ aperos en la eldonejo KAVA-PECH.

Ni nur deziru, ke ekaperu multaj fakuloj publike konataj pro iu fako, kiuj same uzu sian famecon por similefike propagandi Esperanton.

Petro Chrdle

## La fascina lingvo

Komence de la jaro la Esperanto-societo en Turku (EST) aranĝis ekspozicion pri Esperanto en la ĉefbiblioteko de Turku kaj poste en la ĉefbiblioteko de Kaarina.

La ekspozicioj portis nomon *Esperanto, kiehtova kieli* (Esperanto, fascina lingvo) laŭ la broŝuro de E@I. En Turku la ekspozicio troviĝis dum 5–31 jan 2010 en la dua etaĝo de la biblioteka konstruaĵo. Esperanto estis prezentita multflanke pere de ok grandaj afiŝoj kaj kun multaj kongresaj bultenoj; krome estis libroj, gazetoj, KD-oj kaj poŝtmarkoj. La afiŝoj rakontis finlingve i.a. pri renkontiĝoj, kongresoj, gazetoj, uzo de interreto kaj nature pri la vivo de Zamenhof. Ankaŭ gramatiko en nuksoŝelo kaj informoj pri EST kunestis.

La vizitantoj povis kunpreni de la ekspozicio fin- aŭ svedlingvan faldfolion pri nia societo, informilon pri kursoj en Finnlando kaj en la reto, kaj krome esperantlingvan turisman broŝuron pri Turku.

La bibliotekoj informis pri la ekspozicioj en siaj hejmpaĝoj. Ili eĉ faris gazetaraĵn komuniketojn, surbaze de kiuj lokaj gazetoj informis pri la ekspozicioj.

Inter la gazetoj legeblaj en la ĉefbiblioteko de Turku troviĝas *La Ondo de Esperanto, Esperanto, Esperanta Finnlando* (finne: *Esperantolehiti*) kaj la informilo de EST (*vidu la suban foton*).

En februaro pli-malpli sama ekspozicio ekfunkciis en la ĉefbiblioteko de la najbara urbeto Kaarina. Ankaŭ en ĉi tiu biblioteko troviĝas bretaro kun donacitaj esperantlingvaj gazetoj.

Koran dankon al ĉiuj kiuj helpis nin ebligi la ekspozicion. Specialan dankon la organizantoj esprimas al Stano Marček, kiu sendis fotojn je nia dispono, kaj al Tuomo Grundström k.a. pro kontrolado de afiŝaj tekstoj.

Tiina Oittinen



## Ekspozicia omaĝo en Angers

Okaze de la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof la Esperanto-grupo en Angers (Francio) pretigis ekspozicion pri Esperanto, kiu estis videbla en la urba biblioteko dum ĉirkaŭ unu monato en la fino de la jaro.

Dum tiu tempo okazis tri gravaj eventoj. 24 nov en ĉeesto de oficialuloj de la urbodomo kaj de la biblioteko, kaj kun partopreno de L. Zaleski-Zamenhof, nepo de la iniciatinto de Esperanto, la ekspozicio estis solene inaŭgurita. La unuan tagon de decembro André Cherpillod prelegis en la urba biblioteko pri la temo *l'espéranto, hier et aujourd'hui*. 12 dec en Angers okazis Zamenhof-festo kun partopreno de samideanoj el region-najbaraj grupoj.

Pierre Jagueneau

## La Verko de la Jaro 2009

(HeKo) Ok poeziaj titoloj kandidatas por la PEN-premio *La Verko de la Jaro 2009*, laŭ indiko de la membroj de Esperanta PEN-Centro. La abonantoj de *Literatura Foiro* referendumo elektos inter ili la gajninto(j)n, ĝis 30 apr 2010.

Temas pri *Kajto* de Mikaelo Bronŝtejn, *Koploj kaj filandroj* de Jorge Camacho, *Malgajaj sonetoj* de Malfrua Somero, *La neceso akceptebla* de Baldur Ragnarsson, *Taglibro de nenifaranto* de Nicola Ruggiero, *Verse reversi* de Benoît Philippe, *Vespere* de Mikaelo Giŝpling kaj *Yvonne. Sonetoj malsekretaj* de Timothy Brian Carr. La aŭtoroj ĝenerale ne estas debutantoj: en unu kazo, eĉ kvazaŭ klasikulo; en alia kazo, Florluda Majstro.

## Esperanto kiel pontolingvo

En la unua semajno de la ĉiujara Kolkata librofoiro, la socihelpa kaj kultura organizaĵo *Samatat Sanstha* (Kolkato, Barato) okazigis 29 jan 2010 en la salono *Indumati Sabhagriha* de la universitato Jadavpur la lanĉon de tri porinfanaj libroj, kiujn ĝi eldonis en kadre de kvarlanda projekto *Unu barata infanlibro en Eŭropo — tri eŭropaj infanlibroj en Barato*. Estis lanĉitaj peresperantaj bengaligoj de la itala romano *Taglibro de Joĉjo Tempesto* de Vamba, la slovena novelaro *Mi volis tuŝi la sunon* de Tone Partljickaj, la kroata romano *Wakajtapu* de Joza Horvat.

La traduka kaj eldona laboro estis farita partnere kun *Edistudio* (Italujo), *Interkulturo* (Slovenujo) kaj la kunordiga partnero KEL (Kroata Esperanto-Ligo), kiuj lanĉas sialingvajn elbengaligojn peresperantajn de la barata romano *Vivo de Damaru* de Trailokyanath Mukhopadhyay. KEL akiris projektan subvencion de la Europa Komisiono. Krome sponsoras ĝin la Esperanta Studfondaĵo, la kroata Ministerio pri Eksteraj Aferoj kaj Eŭropa Integriĝo, la kroata Ministerio pri Kulturo kaj la urbo Zagrebo.

La librojn formale lanĉis la ĝenerala konsulo de Italujo en Kolkato, Silvio Pentrella. Gastprelegis prof. Amlan Datta (eksrektoro de la universitato Visva-Bharati). Partojn el la libroj laŭlegis prof. Sugato Hazra (universitato Jadavpur), prof-ino Sumita Chakrabarti (emeriĝinta el la universitato Bardhaman) kaj prof. Abhijit Mukherji (universitato Jadavpur). Prelegetis prof-ino Sumita Chakrabarti pri la bengala infanliteraturo kaj la tradukinto d-ino Malasree Dasgupta pri la traduko de la libroj lanĉataj.

*Samatat* surpodie donacis ekzemplerojn de la libroj al lernejanoj. Prof Probal Dasgupta, la barata kunordiganto de la projekto, prezidis la eventon kaj prezentis faktojn pri *Samatat*, pri la projekto kaj pri la pontolingvo Esperanto. Kantado de la konata kantistino Nabanita Chattopadhyay komencis kaj finis la prezenton.

Ĉeestis pli ol cent personoj. La alportita stoko da libroj tuj forvendiĝis. Surlo-kaj komentantoj juĝis la eventon sukcesa kaj bone organizita (unu universitata dekano nomis ĝin la plej sukcesa libro-lanĉo, kiun ŝi iam ĉeestis) kaj estis pozitivaj pri la libroj mem.

**Probal Dasgupta**

**Sur la foto:** Estas grave, ke la libroj de ĉi tiu projekto estas eldonitaj por tiuj, kiuj legas ilin. (Fotis Malasree Dasgupta)

## KCE: monatfino zamenhofologia

Plena salono Klara Zamenhof Zilbernik sabaton la 30an de januaro por la prelegoj de Francisko Degoul kaj Giorgio Silfer, kun la aldono de skribaj kontribuoj fare de Aleksander Korĵenkov.

La tuta semajnfino analizis la figuron de Zamenhof laŭ historiografia vidpunkto. Francisko Degoul krokizis la enhavon de la ĉefaj biografioj pri Zamenhof ekde Edmond Privat en 1920 ĝis Aleksander Korĵenkov en 2009. Distingi hagiografion de biografio estas kvazaŭ spikumi inter lolo kaj greno: ankaŭ ĉar, ĝis *Homarano* de Korĵenkov, oni ne renkontas proporcie ekvilibrantan pritrakton inter la iniciatoro de esperanto kaj la judo. Kutime la dua faceto ne estas sufiĉe kaj adekvate prilumita, dum ĉe *La kaŝita vivo de Zamenhof* fare de N.Z. Maimon estas inverse.

Giorgio Silfer komparis la finvenkisman, respektive raŭmisman respondon al kelkaj historiografiaj nodoj: kion fari el la judeco de Zamenhof (ĝis kiam kaj kiom li estis hebreo)? kial, el la du odesaj leteroj, unu plej gravas por la finvenkistoj, dum alia por la raŭmistoj? Kiel situigi la homaranismon en la ĝenerale esperantisman kuntekston? kaj tiel plu. Laŭ Silfer, la finvenkisme inspirita historiografio radikas en la letero al Sinjoro B., dum la raŭmisme inspirita baziĝas sur la leteroj al Kofman (1901), Javal kaj Schneeberger (1905).

La debato praktike preteratentis la skribajn kontribuojn, kaj enfokusiĝis al la prelegoj de la ĉeestantoj.

**HeKo**

## 1450 adresoj en Pasporta Servo

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, *Pasporta Servo*, enhavas 1450 gastigantojn en 91 landoj. En la antaŭa eldono (2008) estis 1225 adresoj en 90 landoj.

En la *Pasporta Servo 2010* la unuan lokon okupas Francio kun 177 gastigantoj. La dua estas Germanio kun 117. En Brazilo estas 84 gastigantoj. Aliaj landoj kun multaj adresoj estas Ruslando (81), Pollando (75), Ukrainio (65), Usono (63), Hungario (53), Japanio, Nederlando, Ĉinio kaj Senegalio (po 36), kaj Irano (34).

En la 208-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj k.a. informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri lokoj kun gastigantoj. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, kaj utilaj adresoj.

La ideo pri *Pasporta Servo*, tiam sub la nomo *Programo Pasporto*, estis prezentita de la argentinano Ruben Feldman González en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj estas gastigantoj ankaŭ en la nuna eldono.

En 2009 *Pasporta Servo* fariĝis ankaŭ socia retejo, [www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org), kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. La repaĝo ne anstataŭas la adreslibron sed ofertas novajn servojn, haveblajn nur per Interreto: zomebla monda mapo, serĉilo, forumo por peti informojn pri vojaĝo, kaj blagejo por rakonti pri siaj vojaĝoj.

**GK UEA**



## Unufraze

★ La prezidanto de la Eŭropa Parlamento, Jerzy Buzek, 13 jan akceptis tripersonan delegacion de EEU (Margareta Handzlik, Jozef Reinvar, Seán Ó Riain); li promesis akcepti la patronecon de la Hamburga EEU-konferenco en majo 2011. (*Eŭropa Bulteno*)

★ La londona firmao *Eurotalk* aldonis Eon al siaj lernmetodoj, kiujn ĝi proponas por 120 lingvoj; la E-versio konsistas el kvin KDOj aparte aĉetebaj: “Talk Now Esperanto” (por komencantoj), “Talk More Esperanto” (por progresantoj), “Vocabulary Builder Esperanto” (por infanoj), “Business Talk Esperanto” (profesia aplikado), “Talk Talk Esperanto” (por junuloj). (ĈIIC)

★ 15 dec la Reĝa Akademio de Medicino de Katalunio k Kataluna E-Asocio kunorganizis kunvenon por festi la 150-jariĝon de Zamenhof — okulkuracisto k iniciatoro de Eo. (*Kataluna Esperantisto*)

★ SAT-Amikaro k *Langue Espéranto 64* starigis E-budon okaze de la Paŭa manifestado *Paŭo festas la libron* en la prestiĝa “Palais Beaumont”. (*La SAGO*)

★ La Voka Centro en Ŝanhajo, kiu liveros per telefono bazajn informojn pri Ŝanhajo k servojn al alilandanoj dum la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, havas Eon inter siaj 17 laborlingvoj. (ĈIIC)

★ 16 feb 2010 en Zagrebo prof. Mark Fettes prelegis en Asocio de universitataj profesoroj pri la temo “Lingvo kiel tranĉilklingo — tradukado en ekologia kunteksto” k sekvatage partoprenis lanĉon de tri eŭropaj infanlibroj tradukitaj al la bengala per Eo. (Landa Agado)

★ Nijl Blonstein okazigis E-fotokespozicion ĉe Community Church en Novjorko. (*Usona Esperantisto*)

★ Je 21 feb 2010 al la 95a UK en Havano aliĝis 599 personoj el 51 landoj, plej multe el Francio 95, Japanio 55, Germanio 52, Brazilo 44, Italio 27, Nederlando 26, Belgio 18, Pollando 18, Britio 16, Danlando 15, Kroatio 15, Litovio 15; estas nur 14 aliĝoj el Kubo (sen kalkuli la kubanojn aliĝintajn ĉe LKK). (uea.org)

★ 18 jan en la hotelo *Piramida* en Maribor (Slovenio) okazis solena kunsido de la loka E-societo, fondita antaŭ cent jaroj; pri tio vaste informis lokaj k landaj amaskomunikiloj. (*Eŭropa Bulteno*)

★ La 32a kongreso de Pakistana E-Asocio (dec 2009, Lahore) decidis establi bibliotekon en la oficejo de E-Internacia Akademio. (*Esperanto en Azio*)

## SES por lernemaj kaj instruemaj

Somera Esperanto-Studado (SES-2010), la tria fizika *lernu!*-renkontiĝo, okazos 2–10 jul 2010 en la slovaka banurbo Piešťany, 80 km de Bratislavo kaj 160 km de Vieno.

*Antaŭtagmeze* okazos instruado pri Esperanto; *posttagmeze* ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.; *vespere* nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, teatraĵoj, filmo-spektado, diskoteko...

La Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en kvar grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Pri la *lernu!*-programeroj zorgos la teamo de *lernu!* Eblos ĉeesti prezentojn pri *lernu.net*, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s.

Ĉiujn instruemajn esperantistojn ni invitas ĉeesti la porinstruistan seminario *Flugiloj de malfacila vento* sub la gvido de ILEI-spertuloj.

Okazos ankaŭ ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro laŭ la niveloj B1, B2, C1. La seminario de TEJO *Instigi Kreemon* celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn.

Pliaj informoj: [www.lernu.net/ses](http://www.lernu.net/ses)

Peter Baláž



## IFEF: kvarafoje en Bulgario

Bulgaraj fervojistoj-esperantistoj invitas partopreni la 62an kongreson de IFEF, kiu okazos 8–15 maj 2010 en Sofio — la ĉefurbo de Bulgario. La bulgara IFEF-sekcio por la kvara fojo gastigos la kongreson. La esperantistoj kiuj vizitis la kongresojn en Varno (1968), en la turisma ripozejo Suna Bordo (1984) kaj en Plovdiv (2002) memoras la agrable travivatajn tagojn en Bulgario.

Dum la kongreso okazos, krom la laborprogramo, tuttaga ekskurso en Vraca kaj Belogradĉik kaj duontaga ekskurso en Sofio. Post la fino de la kongreso okazos postkongreso en Velingrad, la perlo de la montaro Rodopi.

Petu pliajn informojn ĉe LKK:

✉ str. Ivan Vazov 3, BG-1080, Sofio, Bulgario

☎ +359 887090163, +359 889362523

✉ [veskam@abv.bg](mailto:veskam@abv.bg), [petia\\_aleks@abv.bg](mailto:petia_aleks@abv.bg), [renag@mail.bg](mailto:renag@mail.bg)

## Frusomera FREŜO vokas

La tradicia Frusomera Renkontiĝo de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtino okazos 1–7 jul 2010 en Kortowo — la plej bela universitata urbeto en Pollando. Kortowo estas kvartalo de Olŝtino.

De multaj jaroj FREŜO arigas ĉ. cent personojn el Pollando kaj aliaj landoj. Ĉiam FREŜO havis apogon de lokaj instancoj, kaj tial pasint-jare multaj freŝanoj ĝojis pro granda rabato. Ankaŭ ĉi-jare la organizantoj ricevis malgrandan subvencion, kaj eventualan rabaton ricevos tiuj, kiuj plej frue pagos la aliĝkoton.

La principo de FREŜO estas: multe da distraĵoj, ripozo, ekskursoj kaj kvizoj kun riĉaj premioj; kaj nur malmulte da prelegoj.

En la programo estos interalie:

— Ekskurso al la famaj kaj historiaj lokoj Grünwald kaj Olsztynek;

— Prezento de JoMo;

— Vizito de tradicia varmia restoracio *Karczma Warmińska* en Gietrzwałd (prezento de lokaj dancoj, sed ne nur);

— Promenadoj tra interesaj lokoj de Olsztynek;

— Solenaĵo okaze de la 50a datreveno de la Esperanto-movado en Varmio kaj Mazurio;

— Vizito en la apudolŝtina arbarĝardeno (pro grava kialo);

— Ĉiutagaj kvizoj kun riĉaj premioj;

— Esperantaj piknikoj;

— Interesaj prelegoj, interalie pri 600a datreveno de la Grünwald-a batalo.

Ĉi-jare tuj post FREŜO unuafoje okazos Grandpoluja Esperanta Somero en Wagrowiec (60 km de Poznano).

Pliajn informojn pri la aliĝo, loĝado kaj programo vidu rete:

<http://www.esperantowolsztynie.pl>

Marian Zdankowski

## Kongresi en Esperanto-Domo

14–16 maj 2010 okazos sveda jar-kongreso en la Esperanto-Domo en Lesjöfors, Svedio. Oni povas alveni pli frue por tuttaga antaŭkongresa ekskurso. En la programo estos prelego *Unu lingvo, malsamaj kulturoj* de Kristin Tytgat kaj teatroprezento de Georgo Handzlik. Junulara aranĝo okazos paralele.

✉ Ulla Luin, Myggdalsv. 123, SE-13542 Tyresö, Svedio.

✉ [sfkongr2010@esperanto.se](mailto:sfkongr2010@esperanto.se)

<http://www.esperanto.se>

Ulla Luin

## La angla venkas

### Dafydd ab Iago el Bruselo

La Eŭropa Unio estas granda eksperimento. Ŝajne neniam en la historio de la homaro kunfluis tiom pace la evoluo de tiom da diversaj nacioj. Ĉiam antaŭe la unuiĝon puŝis perforto aŭ domino de unu nacio super alia(j). Tamen sub tiu ŝajno de egaleco, la unuiĝo realiĝas ĉiam pli angle.

Nun eĉ la plej lingve nesentemaj en Bruselo ŝokiĝas. Antaŭ la ekfunkcio de la nova Eŭropa Komisiono estis diskutata interna dokumento, laŭ kiu 20 el la 27 proparolantoj estus denaskaj parolantoj de la angla, kiuj pli kapablas komunikiĝi en la pli kaj pli anglalingva EU.

Laŭ la reguloj ĉiu membro-ŝtato havas la rajton je unu membro de la Eŭropa Komisiono. Tio signifas ke estas ankaŭ 27 proparolantoj, kiuj respondecas pri rilatoj kun ĵurnalistoj kaj amaskomunikiloj en siaj respektivaj kampoj. La proparolantoj ne nur garantias, ke Eŭropo estas en la menso de 500 milionoj da homoj, ili ankaŭ grave influas la komunikad-politikon de la Eŭropa Komisiono.

Bonŝance eĉ la plej anglalingvemaj altrangaj burokratoj konstatis, ke ne eblas doni 20 el 27 postenoj al parolantoj de nur unu el la 23 oficialaj EU-lingvoj. “La proceduro de la postenigo ankoraŭ daŭras, kaj ŝanĝoj eblos”, — diris la ĉefa proparolantino Pia Ahrenkilde Hansen. Post kelkaj tagoj kaj multe da plendoj, la nova listo montris ke “nur” 12 el la 27 proparolantoj estas denaskaj parolantoj de la angla.

“Post la pligrandiĝo en 2004 ni vidis la komencon de nova inklinado al favorigo de funkciuloj kiuj havas la anglan kiel gepatran lingvon en la salono de gazetaro, — klarigis Lorenzo Consoli, prezidanto de la Asocio Internacia de la Gazetaro. — Tio prezentas la riskon favorigi la lingvan kriterion dum selektado de proparolantoj malavantaĝe al la kvalifikoj aŭ komunikkapabloj... La lingva domino de la angla povas havi efikojn kulturajn kaj politikajn”.

“En EU-institucioj la angla disvastiĝas je la kosto de aliaj potencialaj pontlingvoj, aparte la franca kaj germana. La *malpli internaciaj* lingvoj de la ceteraj membro-ŝtatoj havas en la realo malmultajn rajtojn. Alivorte, ekzistas silenta akcepto de la hierarkio de la EU-lingvoj”, — notis Robert Phillipson en sia brila analizo *Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj*. La kialo estas klara: la manko de komuna lingvo, ĉar laŭ la unua decido (1958/1) rajtas esti lingvoj de EU tiuj, kiuj estas oficialaj sur la teritorio de membro-ŝtato.



Ĉu antaŭvidi apartajn interpretoletojn por la kroata, serba, montenegra kaj bosnia lingvoj? (Foto de la Eŭropa Parlamento)

Phillipson klare montras la mallogikecon de la lingva politiko en EU. Unu post alia novaj lingvoj aldoniĝas, sed la statuso de la oficiala lingvo malfortiĝas. En 1958 la kvar ĉefaj lingvoj de la fondoŝtatoj (la nederlanda, franca, germana kaj itala) teorie havis egalajn rajtojn. Tamen poste oficialiĝis la dana kaj angla en 1972. En 1981 venis la greka. La portugala kaj hispana oficialiĝis en 1985; la finna kaj sveda en 1994; la litova, estona, hungara, latva, malta, pola, ĉeĥa, slovakaj kaj slovena en 2004. En 2005 aldoniĝis la irlandaj; kaj en 2007 la bulgara kaj rumana.

“Probable la egaleco de oficialaj lingvoj ĉiam estis fikcia. La franca estis la ĉefa lingvo dum la fruaj jaroj de la EU-Komisiono en Bruselo kaj restas tia sur kelkaj kampoj, — atentigis Phillipson. — La germanoj akceptis tion, kvankam politikaj kaj komercaj estroj foje plendas, ke germanaj intereso- soj suferas pro tio, ke la germana fakte ne havas la samajn rajtojn”.

La malfortiĝo de la statuso de la oficialaj lingvoj (krom la angla, kompreneble) daŭros. En 2012 Kroatio verŝajne aliĝos al EU, kaj tiam la kroata estos la 24a oficiala lingvo. Post jaroj aldoniĝos la serba, montenegra kaj bosnia. Kvankam antaŭ dudek jaroj oni konsideris ĉi tiujn lingvojn variantoj de la serba-kroata, EU nur devas agi laŭ la regulo 1 de la Konsilio de 1958. Laŭ ĝi ĉiu ŝtato rajtas aldoni la oficialan lingvon, menciitan en sia konstitucio. Por la interpretservoj komenciĝos granda problemo: ĉu antaŭvidi interpretoletojn por interprelistoj el kvar lingvoj aŭ nur el unu?

## Mankas tempo por La Ondo

Dankon pro *La Ondo*, kiun mi rete abonis dum la jaro 2009. Ĝi estas bona revuo, kun multegaj informoj pri ĉio grava okazanta en la Esperanto-movado, sed ankaŭ kun interesaj historiaj aŭ pripensigaj artikoloj el diversaj fontoj.

Mi tamen ne reabonos, sed nur pro simpla kialo: mankas al mi tempo! Mi jam legas la revuon *Esperanto*, *La Gazeton*, *Literaturan Foiro*n, du naciajn bultenojn, aŭskultas Polan Radion kaj Radion Vatikanan... Mi devas konstati, ke pli mi ne kapablas, ĉar ankaŭ aliajn, sufiĉe tempopostulajn okupojn mi havas. Estis iom malfacile por mi trovi tempon por legi ĉiujn numerojn de *La Ondo* en 2009. Estus same en 2010. Tial do, bedaŭrinde, mi ne reabonos ĉi-jare. Mi ja mistrafos kelkajn min interesantajn artikolojn, domaĝe, sed mi estas nura homo kun limigitaj kapabloj...

Francisko Lorrain (Kebekio, Kanado)

## Saĝa kombino de etoso kaj kulturo

Via revuo estas elstara pro tio, ke ĝi estas saĝa kombino de la Esperanto-etoso en Esperanto-aranĝoj, kion vi abunde peras, kaj de Esperanto-kulturo kiun vi prilumas kaj probleme kaj belarte.

La movadaj novaĵoj min malpli interesas, ĉar ni movadas delonge kun preskaŭ nulaj rezultoj, la ŝtono de la movado ne moviĝas. Sed la ŝtono de la Esperanto-kulturo, moviĝas almenaŭ per la kresko de la ŝtono mem kaj lingva pliriĉiĝo esprimiva. Kaj la etoso de Esperanto-aranĝoj estas kio subtenas nian deziron re- kaj re-veni al ĝi, ĉu vizite, ĉu legante kaj kunetosante virtuale. Kaj ne laste vi estas sola revuo, kiu abunde provizas nin per pensoj-eldiroj de elstaraj kaj simplaj esperantistoj. La februara numero de *La Ondo* estas pinte interesa por mi...

Anatolij Gonĉarov (Ruslando)

## La solvo de la problemo pri neŭtraleco

**(HeKo)** La nuna konflikto inter Universala Esperanto-Asocio kaj Eŭropa Esperanto-Unio gravitas ĉirkaŭ la kutima problemo pri neŭtraleco. Efektive la formulo de Kolonjo 1933 (naskojaro de la Tria Regno), daŭre aplikata en UEA, tute ne funkcias.

La Esperanta Civito proponas tute alian formulon, kiu ĝis nun perfekte funkcias: aperas decidoj kun politika enhavo, kiuj tamen ne kompromitas la politikan neŭtralecon de la paktintaj establoj. Ĉu la aliĝo al la kampanjoj kontraŭ grapolbomboj, kontraŭ minoj, kontraŭ perforto al virinoj, kontraŭ mortopuno ktp ne estas politikaj elektoj? Certe jes, sed ili ne lezas la neŭtralecon de la paktintoj. Ĉu la deklaroj pri la baldaŭa milito en Irako, pri Tibeto, pri la Sankta Lando ne estas politikaj deklaroj? Certe jes, sed ili respektas la neŭtralecon de la paktintoj. Kial?

Ĉar la Esperanta Civito ne havas unu, sed du Komitatojn (legu: du branĉojn de sia Parlamento), el kiuj unu (la Senato) devontigas la individuojn, sed ne la kolektivojn; dum alia (la Forumo) devontigas ankaŭ la kolektivojn. Tial la rezolucioj kun politika enhavo pasas tra la Senato, dum tiuj kiuj celas la koherigon de la cirkvito ĉirkaŭ la Pakto (mutuala rabata sistemo, komuna internacia biblioteka sistemo, lingvotesta sistemo ktp) pasas tra la Forumo. Por tuje distingi la normojn de ambaŭ oni uzas eĉ malsamajn vortojn: la Senato aprobas leĝojn, la Forumo aprobas direktivojn. Eĉ la aplikoj de tiuj normoj, fare de la estraro (legu: la Kapitulo), havas malsamajn nomojn: dekreto pro leĝo, edikto pro direktivo.

Laŭ la Civita formulo nur la raŭmistoj, nome tiuj kiuj akceptas la sociologian priskribon resumitan en la Kvintezo de la Pakto, kaj do petis la esperantan civitanecon, prenas sur sin la individuan respondecon esti liberaj, anstataŭ enfermiĝi en la kaĝon de la strikta neŭtraleco. Ja la paktintaj establoj povas inkluzivi membrominoritaton kiu ne praktikas raŭmismom, en sia esperantisteco: ĝi ankaŭ rajtas ekzisti, evidente. Raŭmismo restas malfermita al ĉiuj, dum finvenkismo estas fermita kontraŭ raŭmistoj. Nature, korpo preta akcepti ĉion havas ankaŭ la proprajn antikorpojn, en kazo de elekstera agreso.

Efektive, la Civita formulo funkcias sur la bazo de tiu komuna sociologia priskribo, kiu montras sin pli taŭga ol tiu de “neregistara movado por multlingvismo”, al kiu evoluis UEA.

**Giorgio Silfer**, Konsulo de la Esperanta Civito

## Yahoo, ĉu kontraŭĉapela?

En via tre interesa magazino *La Ondo de Esperanto*, kiun en nia amika rondo mi interŝanĝas kontraŭ alia gazeto, plia artikolo atentigis min. En la januara *Ondo*, sur la paĝo 11 dekstre en la lasta paragrafo de la artikolo far sinjoroj Yves Nevelsteen kaj Peter Baláž pri ĉapelitaj literoj, oni legas ke *Yahoo* estas granda malamiko de supersignoj.

*Yahoo* ne estas mia preferata retkesto, ne pro la tekniko sed pro alia afero, sed mi povas aserti ke tio estas malvera, ĉar per *Yahoo* mi povas skribi la ĉapelitajn literojn, kial mi kaj ne la aliaj?

**Roger Arcen** (Francio)

**Se iun tekston en *La Ondo* vi trovas interesa aŭ komentinda skribu vian opinion pri ĝi.**

## Diplomlaboraĵo: kiom da akcentoj?

Mi konfesas, ke la januara *Ondo* kontentigis min. Mi trovis en ĝi ĉion, kion tiaspaca magazino devas enhavi: informojn, gramatikaĵojn, historion, literaturon, recenzojn kaj eĉ humuron. Kaj mi esperas, ke la postaj numeroj estos same interesaj.

En la januara numero ekinteresis min la eseo de Ryszard Rokicki *Akcento en la kunmetitaj vortoj*. Kvankam la afero pri la akcento estas solvita per la regulo 10 de la *Fundamento*, estas grave, ke fakuloj okupiĝas ankaŭ pri detalaj kaj fajnaj aferoj de la Esperanta gramatiko. Problemo estas en tio, ĉu ili trovos komunan rezulton, aŭ ĉu ili venos al rezultoj malsamaj. Por mi persone la afero de “akcento en kunmetitaj vortoj aŭ simple en longaj — multisilabaj vortoj” estas jam longe solvita. En sia *Granda slovaká lernolibro de la internacia lingvo Esperanto* (1949) la slovakaj muzikkomponisto Ján Valaštan Dolinský dediĉis al la akcento preskaŭ du paĝojn. Kiel muzikisto li bone perceptis la melodion de la parolata Esperanto, kaj laŭ la ĝenerala prononco li deduktis la regulojn por la ĝusta utiligo de la akcentoj, precipe en kvarsilabaj kaj pli longaj vortoj. Li certe studis ankaŭ la Plenajn Gramatikajn kaj ankaŭ aliajn fakajn librojn.

Dolinský klarigas, ke en la fermitaj silaboj la akcenta vokalo estas mallonga, dum en la malfermitaj silaboj (kie inter la akcentata vokalo kaj la finaĵo troviĝas aŭ neniuj aŭ nur unu konsonanto) la akcentata vokalo estas longa. Du akcentataj silaboj ne povas sekvi senpere unu la alian. En almenaŭ kvarsilabaj vortoj aperas ankaŭ flankaj akcentoj, kiu laŭ Dolinský troviĝas sur la unua silabo; se la vorto havas pli da silaboj, tiam la flankaj akcentoj estas ankaŭ sur la tria kaj ĉiuj posta malpara silabo. Sed laŭ Rokicki la vorto “diplomlaboraĵo” havas la akcentojn diplóm-laboráĵo, laŭ Dolinský la akcentoj estas díplom-láboráĵo.

Dum mia vivo mi partoprenis kelkajn (nemultajn) Universalsajn Kongresojn kaj aliajn internaciajn konferencojn kaj kunvenojn, sed neniam mi renkontis problemon rilate al la akcentado de kunmetitaj vortoj. Tamen estas bone, ke la esperantistaj lingvistoj okupiĝas pri la afero kaj strebas trovi la ĝustan kaj ĝenerale akcepteblan solvon.

**Jiří Patera** (Ĉeĥio)

6 feb 2010 en Chambéry (Francio) forpasis

**Raymond Boré (1925–2010)**

komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-objektoj (2001–2009), Dumviva Patrono de UEA (2001), laŭreato de la diplomo de UEA pri Elstara Agado (2009) kaj de la premio Ada Sikorska Fighiera (2005).

7 feb 2010 forpasis

**Luna Davidova (1926–2010)**

aktorino el la Nacia Porjunulara Teatro en Sofio ekde 1952 ĝis 1988, laŭreato de la bulgara ŝtata ordeno Kirilo kaj Metodio. Lerninte Esperanton en 1984, ŝi aliĝis al la Bulgara Esperanto-Teatro kaj prezentis en ĝi plurajn rolojn en Bulgario kaj alilande.

11 feb 2010 en Romo forpasis

**Umberto Broccatelli (1931–2010)**

esperantisto ekde 1947, membro de la Nacia Konsilio de IEF (1980–2005), redaktoro de *L'esperanto* kaj de *Eŭropa Bulteno* (1999–2004), reaktiviginto de EEU (1999) kaj ties honora prezidanto ekde 2004, Honora Membro de UEA (2006), aŭtoro de du vortaroj, unu lernolibro kaj pluraj broŝuroj.

*Ni funebras kaj kondolencas.*

← → ↻ http://maps.google.com/

Web Oĉrakoj Mapy Prekladaĉ Blogy Katalog Gmail viac ▼

esperanto666@gmail.com | Mj profilo | Novinkal | Historia ĥadania | Mj ŭĉet | Pomocnik | Odĥlasiť sa

Google maps  Hĥadati mapy Ĉo sa nachádza v okoli? Zobraziti moĥnosti vyhĥadavania

Najst firmo, adresy a miesta zājmu.

Vyhĥadati cestu Moje mapy

Uloĥiti do prieĥnika Moje mapy

**Esperanto en Bjalistoko**  
Ĉiuj ZEO-j (Zamenhof-Esperanto-Objektoj) kiuj troviĝas en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. 5 304 zobrazeni - Verejne Vytvoreni 17. oktobro 2008 - Aktualizovane 29. oktobro 2011 Vytvoril: p.wierzbowski Ohodnotite ĥutu mapu - Napisati pripomienku

- Bjalistoka Esperanto-Societo, strato Piekna 3**  
En ĥama domo de sinagogo nun estas inter alie
- Naskiĝloko de Ludoviko Zamenhof**  
Ĉi tie estas kelkaj ZEO-j: \* marmora memortabulo
- Porinfana Kliniko Hospitalo Ludoviko Zamenhof**  
La kliniko ĉe la strato Waszyngtona havas nomon de
- Domo de Jakobo Ĥapiro**  
Ĉe la strato Lipowa 31/33 staras domo, en kiu loĝis
- Ĥama Reala Gimnazio**  
En la konstruaĵo, en kiu nun troviĝas liceo n-ro 6, iam
- Monumento al Ludoviko Zamenhof**
- Tombejo de faĥistaj viktimoj**  
Inter miloj da bjalistokanoj, mortigitaj en la arbareto
- Bazilemo n-ro 51**  
Bjalistoka bazilemo, kiu baldaŭ havos nomon
- Trajno Zamenhof**  
Ĉi tie troviĝas ĉefa bjalistoka stacidomo, en kiu

Esperanto, Bialy... | Bjalistok, Pofsk...

## Uzado de mapoj en Interreto

Esperantistoj estas ege vojaĝemaj. Tial estas bone scii pri utilaj servoj, kiuj estas troveblaj en interreto por facile kaj rapide vojaĝi. Mapoj en interreto povas servi al ni trovi bezonatan lokon, aranĝon, gastiganton ktp.

### Google Maps kaj Google Earth

Verŝajne la plej konata tiaspeca servo internacia estas la retejo de Guglo *Google Maps* <http://maps.google.com/>

Alia utila ilo de la sama firmao por pli bone konatiĝi kun nia Tero (ne nur urboj, stratoj, sed same riveroj, maroj, montoj, arbaroj ktp.) estas *Google Earth*: <http://earth.google.com/>. Ĝi estas instalenda programo en diversaj lingvoj kaj por ĉiuj tri operaciumaj sistemoj: Vindozo, Linukso kaj Makintoŝo.

La aplikajo *Google Earth* ebligas al vi aperigi satelitajn fotografaĵojn de iu ajn loko sur Tero, vidi mapojn, terenon, eĉ 3D-konstruaĵojn, ekde galaksioj ĝis oceanaj fosegoj. Vi havas eblon esplori riĉan geografian enhavon, konservi lokojn, kiujn vi vizitis kaj kunhavigi ilin al aliaj. Inter ĝiaj funkcioj troviĝas historiaj fotografaĵoj el la tuta mondo, datumoj pri fundoj kaj akvonivelo de oceanoj de maristaj fakuloj aŭ trarigardoj kun eblo registri sonon kaj voĉon.

### OpenStreetMap - liberaj mapoj de la mondo

La fakto, ke preskaŭ ĉiuj supozataj liberaj mapoj havas leĝajn aŭ teknikajn restriktajn, kiuj malhelpas al ni uzi la datumojn kree, produktive aŭ noveme, kaŭzis naskiĝon de la projekto *OpenStreetMap* (<http://wiki.openstreetmap.org/>), kies celo estas kreado de liberaj geografiaj kartoj de la mondo, ekzemple, aŭtaj kaj biciklaj mapoj ktp. (La ĉefa mondmapo videblas ĉe: <http://www.openstreetmap.org/>)

Por krei karton redaktantoj uzas ĉefe datumojn akiritajn per GPS-sistemo, kiuj estas sekve kontrolataj kaj redaktataj. Ĝi baziĝas sur kolektiva kunlaboro kaj malfermita koda ideo. Kunlabori aŭ alimaniere subteni la projekton povas iu ajn. Eĉ tiu, kiu ne posedas GPS-navigilon, povas helpi, sufiĉas bonaj

konoj de tereno kaj JOSM. En lasta tempo la nombro da registritaj redaktistoj sufiĉe kreskas — en marto 2009 estis 100 mil, nun la nombro duobliĝis.

La datumoj kaj bildoj estas disponeblaj laŭ la permesilo de Kreiva Komunaĵo: CC by-sa 2.0 aŭ alia permesilo, kiu kongruas kun ĝi. Datumoj, kiuj malobeas jenan kondiĉon, devas esti forviŝitaj, same kiel ĉiuj ŝanĝoj, kiuj iamaniere rilatas al ili. Do atentu pri la datumoj, kiujn vi enmetas.

Kaj speciale por ni esperantistoj jam ekzistas la unua mapo en Esperanto, rigardu ĝin ĉe: <http://cassini.toolserver.org/tile-browse/browse-co.html>.

### Maps For Free

Diversspecaj mapoj ofertataj ankaŭ sub la permesilo GNU Free Documentation License. Krom kutima aŭta mapo eblas aperigi satelitajn fotografaĵojn, terenon kaj reliefon, kun eblo aldoni diversajn tavolojn (akvospaĉoj, dezertoj, arbaroj ktp.). Ĝi enhavas ankaŭ ilon por integri deziratan mapon en ekzistantajn *Google Maps* projektojn.

<http://www.maps-for-free.com/>

### Diverseco enhava kaj lingva

En la reto troviĝas pluraj mondmapo en diversa kvalito kaj kun diversaj servoj, tamen problemo estas ofte lingvo de ilia interfacio. Kelkaj, kiel *Bing Maps* (posedata de Microsoft) disponigas vere multajn lingvojn por la interfacio, aliaj ofertas nur kelkajn, ekzemple: *Mappy* (<http://en.mappy.com/>), *Mapquest* (<http://www.mapquest.com/>) aŭ *Yahoo Maps* (<http://maps.yahoo.com/>). Krom ili ekzistas kompreneble multegaj naciaj mapo-paĝaroj.

La retaj maposervoj tamen servas ne nur dum vojaĝado kaj serĉado de vojo aŭ tranokto. Oni utiligas la servojn diversmaniere; dum la tertremo en Haitio *OpenStreetMaps* vere rapide reagis kaj publikigadis tre aktualan mapon de la lando. La mapo estis aktualigata en 5-minutaj tempintervaloj, kio multe helpis kaj plifaciligis la situacion por surloka helpo.

**Katarina Nosková, Peter Baláž**



# Poemoj de Aleksandr Puŝkin

Kutime en la rubriko *Rusa Novelaro* ni kelk-fraze skizas la vivon kaj kreadon de ĉiu prezentata poeto, sed estus strange memori la vivojarojn kaj la ĉefajn verkojn de la plej granda rusa poeto **Aleksánder Sergejeviĉ Puŝkin**. Prefere legu senpreface kelkajn liajn versaĵojn en novaj tradukoj de Valentin Melnikov.

## AL LA VARTISTINO

Ho amikin' de temp' amara,  
Kaduka mia kolombin',  
En solo, en densej' arbara  
Delonge vi atendas min.  
Vi sub fenestro de kabano  
Angoras, kvazaŭ en deĵor',  
Kaj en sulkoza via mano  
Trikiloj lantas dum labor'.  
Tra l' forgesita pord' rigardas  
Vi al lontana nigra voj';  
En via brusto preme ardas  
Sopiro, zorgoj kaj malĝoj'.  
Al vi jen ŝajnas...

\* \* \*

Mi amis vin. Kaj mia am', envere,  
Ne tute estingiĝis en anim';  
Sed ĝi ne plu vin tuŝu eĉ pretere;  
Ne volas mi ĉagreni iel vin.  
Mi amis vin senvorte, senespere,  
Premata de ĵaluzo kaj fascin';  
Mi amis plej sincere kaj tenere –  
Ke nun alia same amu vin.

\* \* \*

Ermitoj piaj, kaj la inoj ĉaste helaj,  
Por levi kore sin al sferoj transcĉielaj,  
Kaj por firmigi l' koron en batal', enŝtorme,  
Kunmetis preĝojn di-adorajn plej multforme;  
Sed el ĉi tiuj preĝoj sole min inspiras  
Nur tiu, kiun sacerdot' ripete diras  
En tagoj de malĝojo dum Karesma Fast';  
Al mia buŝo venas ĝi plej ofte, sen prokrast',  
Subtenas la falinton per la fort' mistera:  
Sinjoro mia! Pekon de senag' sufera,  
Potenc-avidon, ĉi kaŝitan mord-serpenton,  
Al mi ne donu, ankaŭ vantán elokventon.  
Vidigu, Disinĵor', de miaj pekoj multon,  
Ke mia frat' de mi ne havu la insulton;  
Spiriton de toler', humilo, am-ador'  
Kaj de ĉasteco – revivigu en la kor'.

## AL ĈAADAJEV

Pri am', esper', kvieta gloro  
Trompita estis naivul';  
Degelis juna rev' en foro,  
Samkiel songo aŭ nebul';  
Sed brulas plu en ni pasio:  
Sub jugo de fatal-potenc'  
Ni per anim' sen pacienc'  
Aŭskultas vokon de Patrio.  
Atendas kun sopira ĝuo  
Ni sanktan tempon de liber',  
Samkiel pensas kun esper'  
Junul-amant' pri rendevuo.  
Dum per libero ardas ni,  
Dum koroj vivas por honoro,  
Amik', dediĉu al Patri'  
Impetojn noblajn de la koro!  
Ascendos – kedu, kamarad'! –  
La stelo de feliĉo rava,  
Rusi' vekigós el dormad',  
Kaj niajn nomojn filo brava  
Alskribos sur ruin' de krad'!

## MALLIBERULO

Mi sidas post krad' en malseka karcer'.  
Aglido, kreskinta en la malliber',  
Malgaja amik', kun flugila svingad',  
Sangantan nutraĵon disbekas ĉe l' krad'.

Li bekas, kaj ĵetas, rigarde al ĉel',  
Kun mi kvazaŭ samon havante por cel';  
Li vokas min per la rigardo kaj kri'  
Kaj, ŝajne, parolas: "Forflugu do ni!

Ni, birdoj liberaj, ekflugu sen dub'  
Al for', kie monto blankadas post nub',  
Al for', kie bluas la mara lini',  
Al for', kie vagas nur vento... kaj mi!.."

\* \* \*

Kartvelajn montojn kovras noktkurten';  
Aragvo antaŭ mi bruegas.  
Malpezas mia sent'; mi tristas en seren',  
En mia tristo vi plu regas,  
Nur sole vi... malĝojon mian kun amar'  
Nenio ĝenas, ne formovas;  
La koro brulas plu, kaj amas – simple ĉar  
Ne ami tute ĝi ne povas.

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**



## Metropoliteno

William Auld diversloke diras pri *Metropoliteno* de Vladimir Varankin: “forgesita ĉefverko”, “unu el la plej interesaj kaj maturaj el niaj originalaj romanoj”, kiun “ni dece ŝatu”. Eldonita en la malbonaŭgura jaro 1933 de EKRELO en Amsterdamo, ĝi havis limigitan disvastiĝon pro la aperigo en la klasbatala medio kaj pro la politika situacio. Reeldoninte ĝin en 1977, TK elvokis la romanon el la forgesiteco. Pli vastan konatecon ebligis du samtempaj reeldonoj en Moskvo kaj Jekaterinburg en 1992.

La romano komenciĝas en Berlino, aprile 1928. La sovetia inĝeniero Vitalij Zorin en la germana ĉefurbo studas la konstruadon de metropoliteno, ja li estas plurjara proponanto de la metrokonstruo en Moskvo, kie la transporta situacio estas kriza. Varankin uzas nekutiman verkmanieron: en la unua parto de la romano alternas du rakontoj, *mi-forma* taglibro de Vitalij kaj *li-forma* rakonto el la romano, kiun tiu verkas en Berlino.

La unua perspektivo rilatas al la aktualaj eventoj en Berlino; krom spertiĝi pri konstruado de metropoliteno, Vitalij partoprenas en la aktivado de la germanaj ruĝfrontanoj, agitantaj kontraŭ konstruado de kirasŝipo kiel signo de la germana militemo, disvolviĝas amikaj/amaj rilatoj de Vitalij kaj kamaradino Alice Berg. La dua perspektivo pentras Moskvon unu jaron antaŭ lia alveno al Berlino. Ni vidas lukton de Vitalij kontraŭ Moskvaj burokratoj, kiuj kontraŭstaras konstruadon de metropoliteno. Lia privata vivo stas nekontentige, ni ekscias pri malboniĝantaj rilatoj kun la edzino Olga, kiu pro la longa vivo en mizero ĉiam estas grumblema kaj malĝoja, kvankam kompatinda.

La unua parto de la romano finiĝas per la forveturo de Vitalij el Germanio al Moskvo sojle de la 1a de majo 1929. La verkata de li romano venas samtempe al la tago antaŭ la forveturo el Moskvo al Germanio. Laŭ la aŭtoro “ĉi tie kunfluigas la pasinto kun la estanto”.

En la dua parto per la taglibro de Alice Berg ni ekscias pri la bataloj sur Berlinaj stratoj la 1an de majo, pri ŝia veno en Moskvon kaj renkontiĝo kun Vitalij. Intertempe dum la foresto de la edzo, Olga eklaboras kaj ŝia karaktero pliboniĝas. La fino de la romano estas nereale optimisma. Danke al la partia purigado malamiko estas senmaskitaj, kaj metropoliteno en la proleta ĉefurbo estas



konstruota per la fortoj de la sovetia popolo. Ankaŭ la ŝanceliĝado de Vitalij inter la du virinoj ricevas solvon.

La romano multilate estas biografio, laŭ la aserto de Feina, filino de Varankin: “Olga estas mia patrino, Feino estas mi, la patro estas la protagonisto”.

Vladimir Varankin naskiĝis en 1902 en Nijnij Novgorod en la familio de malaltranga oficisto. En 1920 li finis gimnazion. Post la morto de la patro pro la militaj vundoj en 1921, li vivtenis la patrinon kaj pli junajn fratojn. Li eklaboris en elektroproduktejo, poste aliĝis al la kavaleria lernejo, en kiu li laboris kiel politika organizanto, bibliotekisto kaj klubestro. Fine de 1922 kune kun la lernejo li translokiĝis al Tverj kaj fine de 1927 al Moskvo. Li finis fakultaton de sociaj sciencoj ĉe la Moskva ŝtata universitato kaj instituton pri eksteraj rilatoj. Eklaboris kiel direktoro de teknikum de fremdaj lingvoj, kiu poste transformiĝis je la 2a Moskva ŝtata pedagogia instituto de fremdaj lingvoj kaj gvidis ĝin ĝis sia aresto. En 1935 li eklaboris ankaŭ en la Moskva historia-arkiva instituto kiel docento kaj estro de la katedro pri ĝenerala historio. Membro de la komunista partio ekde 1925.

Varankin lernis Esperanton en la lasta gimnazia jaro kaj tuj aktiviĝis. Li aranĝis propagandajn spektaklojn, eldonis la gazeton *Ruĝa Esperantisto*, verkis, tradukis. Lia aktivado estis rimarkita, en 1921 li eniris en la Centran Komitaton de la ĵus fondita SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio). Li gvidis kursojn ĉeeste kaj koresponde, okupiĝis pri la metodiko de propagando de Esperanto, verkante artikolojn por la gazetoj de SEU. En 1927 li partoprenis la 19an

UK en Danzig. Li verkis la libron *Teorio de Esperanto. Helpilo por superaj Esperanto-kursoj* (1929) kaj kunaŭtoris la lernolibron *Esperanto por laboristoj* (1930). En 1932 en *La Nova Etapo* aperis fragmentoj el *Metropoliteno*. Laŭ rememoroj de lia unua edzino li verkis ankaŭ ruslingvan romanon, kiun li laŭlegis hejme al esperantistoj, sed ĝi ne konserviĝis. Li edziĝis al Avgusta Muravina en 1923, ili havis la filinon Feina, la disiĝo okazis en 1931. Lia dua edzino Maria Galinovskaja estis esperantistino.

En la nokto inter la 7a kaj 8a de februaro 1938 Vladimir Varankin estis arestita kaj akuzita pro «partopreno en la faŝisma spiona organizaĵo “Unia Centro”, ekzistanta en USSR sub la ŝildo de la organizaĵo de esperantistoj, kaj celinta la renverson de la soveta potenco per spionado, sabotado kaj per terorismaj agoj kontraŭ la gvidantoj de VKP(b) kaj de la Soveta Registaro». La mortkondamno estas subskribita la 3an de oktobro 1938. Li estis rehabilitita en 1957.

Pri la lingvaĵo de Varankin ekzistas diversaj opinioj: de “brila” kaj “alternativa” ĉe Auld ĝis “simple fuŝa, atestanta pri nesufiĉa alproprigo de Esperanto” ĉe Benczik. Nu, la romano estis verkita sojle de la 1930aj jaroj, kiam nemultaj originalaj romanoj ankoraŭ ne starigis firman tradicion, kaj la *Plena Vortaro*, aperinta fine de 1930, apenaŭ estis en la manoj de Varankin dum la verkado. Krome, pro la kreskanta izoliĝo de Sovetio, la sovetiaj esperantistoj estis malproksimaj de la internacia E-komunumo. Sed plej grave, en *Metropoliteno* konstateblas kompleta manko de redaktado, pro kio sampaĝe najbaras formoj korekta kaj erara (ekzemple, *aŭtomobilo* kaj *maŝino*). En la 3a eldono (Jekaterinburg, 1992) en la teksto estis forigitaj la plej krudaj eraroj. La stilo, kiun kelkaj recenzintoj nomis “slava”, eĉ kreis supozon, ke Varankin verkis *Metropoliteno* ruslingve, sed ne havante eblecon eldoni ĝin, mem tradukis en Esperanton. Konante lian profesion kaj socian engaĝitecon, oni facile kredas, ke al Varankin mankis tempo por polurado.

*Metropoliteno* aperis ankaŭ en la angla kaj la rusa lingvoj. Estas interese, ke kontraste al Varankin, la romanhero ne estas arda esperantisto, kvankam plurloke Esperanto estas menciita en la romano, ekzemple: “verki en la fremda lingvo estas pli malfacile. Estas multe pli simple pri Esperanto. Du monatoj sufiĉis. Nun mi perfekte ĝin posedas”.

**Halina Gorecka**

## La libro kiu transpasas sian aĝon kaj transdonas sian saĝon

Lapenna, Ivo. *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (Suplemento al Retoriko) / Antaŭparoloj de Gaston Waringhien, Osmo Buller.* — 2a eld., kompletigita. — Rotterdam: UEA, 2009. — 166 p.

Ni estas de longe en la dudekunua jarcento, kiam filmoj, diskoj, videoj alproprigis al si la plejan parton de la hodiaŭa informado. Ĉu do plu valoras eldoni libron kun la teksto de paroladoj, eĉ reeldoni, kun malgranda suplemento, verkon de 1966? La simpla teksto donas nur la enhavan parton de oratorajo, kaj en la kazo de Ivo Lapenna, tiu ne estis la plej granda parto kompare al la sono de liaj vortoj kaj al la vido de liaj gestoj. Libro kiu estis epokfara ĉe sia unua apero riskas arkaikiĝi ne pro sia enhavo, sed pro la teknologio kiu hodiaŭ prezentas aliajn pli efikajn manierojn ĝui paroladon.

Sed la eldoninto akceptis la riskon; fakte, se oni legas, la vervo de la oratoro estas divenebla el la paĝoj, ĝi elsaltas preskaŭ nature: la paroladoj estas bone konstruitaj laŭ la tekniko jam prezentita en alia verko de Lapenna, *Retoriko* (kaj la verko mem surportas subtitolon: “Suplemento al *Retoriko*”). Unue saluto al la ĉeestantoj kaj eniĝo en la etoson, poste la kerno de la parolado, plejofte kun temo pri Esperanto kaj ĝia movado, aŭ pri problemoj de internaciaj rilatoj, tiom karaj al la oratoro, kaj, ĉe konkludo, optimisma fino, kiu altiras aplaŭdojn.

En sia antaŭparolo al la unua eldono de 1966 Gaston Waringhien diris: “Libro analoga al ĉi tiu ekzistas en



Ivo Lapenna (1909–1987)

Esperanto nur unu: la Paroladoj de L.L. Zamenhof”. Ni povus aldoni, ke malgraŭ la paso de la jardekoj ek de tiam, la diro restas prava. De la Majstro aperis pluraj eldonoj de liaj paroladoj, sed de aliaj nenio estis kolektita kun la sama celo: Privat, Tonkin, Frank, Silber, Wells, Waringhien mem kaj tuta aro da prelegantoj prezentis oratorajojn kaj en inaŭguroj, kaj en la Internacia Kongresa Universitato, kaj en amaso da aliaj ĉiuspecaj kunvenoj. Komprenoble, dise en gazetoj kaj libroj aperis multo de ĉiu el la menciitoj kaj de granda nombro da aliaj, sed plia verko celanta skribe transponi oratorajojn de unu sola persono fakte ne aperis.

Analizi la paroladojn de tiu tempo donas certgrade ian melankolian senton: la elano de optimismo, la konscio pri la ĝusteco de la entreprenita vojo, la fiereco pri la atingota celo ne plu estas ĉiam la ĉefa trajto de la paroladoj nunaj, eĉ se farataj en analogaj cirkonstancoj, kiel, ekzemple, la UK-aj inaŭguroj. Tiu-facete la paroladoj de Lapenna similas pli multe la zamenhofajn ol similas la liajn la vortoj de liaj posteuloj.<sup>1</sup> En ĉi lastaj regas pli ofte racio ol emocio, historia perspektivo ol prognozo pri la estonteco. Tial la paroladoj de Lapenna fariĝis klasikaĵoj, for de nia tempo kiel

<sup>1</sup> Pri uzado de vortoj kaj verbaj tempoj, ekzemple komparo inter *-os*-modo kaj *-is*-modo, eble interesas la jena studo: C. Minnaja. *Statistika analizo de la paroladoj de Ivo Lapenna // Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 41, 2, Juni 2000, p. 83–90.

momenta ekzemplo de vervo, sed ĝuste tial daŭre instruaj kaj primeditindaj.

La verko dividiĝas tipografie en tri partoj: la unua kaj la dua, entenantaj respektive paroladojn kaj prelegojn, reproduktas senŝanĝe kaj eĉ samkomposte la unuan eldonon; la tria, klasita kiel “Aldono”, entenas du inaŭgurajn paroladojn, do enhave ĝi estas simple daŭrigo de la unua. Intertempe aperis, en la lastegaj jaroj, kvindiska serio kun paroladoj de Ivo Lapenna: sed nur tri el ili estas la sona originalo de paroladoj de la libro, do la libro restas esence neripetita unikaĵo. Se temas pri UK-inaŭguraj paroladoj, ili estis preskaŭ ĉiam poste presitaj en la organo de UEA, tial pacienca biblioteka elfosanto povus ilin ne malfacile spuri; sed aliaj estis eldiritaj ekster tiu kadro, do ili aperas nur ĉi tie. Mi menciuj kiel ekzemplon la mesaĝon de 1953 al la novzelandaj esperantistoj, kie la finaj frazoj tekstas:

Tute certe venos denove la tempo — eble pli baldaŭ ol oni kutime supozas — kiam la tuta mondo estos malfermita por la Internacia Lingvo kaj kiam, ĝuste tial, la homoj sentos la bezonon pri ĝi ankoraŭ pli intense. Utiligante la lingvon ĉiusence en la nuntempo ni samtempe ĉiam pensu ankaŭ al tiu estonteco, por kiu ni ĉiuj laboras. Estas nia tasko kaj devo konservi la lingvon, evoluigi ĝin ĉiam pli por povi ĝin transdoni en ankoraŭ pli perfekta formo al la estontaj generacioj. Nia respondeco precipe en la nuna momento estas granda, sed mi ne dubas, ke ĉiu, kiu komprenas la esencon de la Internacia Lingvo kaj de ĝia funkcio, faros sian devon.

El tiuj malmultaj linioj reliefiĝas la fido en la lingva instrumento, en la estonta pli justa, ne nur lingva sed ankaŭ socia, ordo, la memdisciplino por la atingo de la celo, la certeco pri la responsokapablo de la popolo: karakterizoj kiuj distingis Ivon Lapenna dum lia tuta vivo esperantista.

Ĉe foliumado de la libro pasas sub la okuloj temoj gravaj: la internacia kunlaboro, la kultura valoro de la internacia lingvo, la lingva diskriminacio, la humanisma internaciismo<sup>2</sup>, la ideologiaj

<sup>2</sup> En *Eseoj memore al Ivo Lapenna* (Kehlet, 2001), la nomo de tiu pens- kaj kondutmaniero, iĝis “humaneca internaciismo”, laŭ posta uzado fare de Lapenna mem.

IVO LAPENNA

ELEKTITAJ  
PAROLADOJ  
KAJ  
PRELEGOJ

elementoj de esperantismo, la arta kreado en Esperanto, la rolo de UEA. Ape-  
 ras la paroladoj de la glora Montevidea  
 aventuro ĉe UNESKO, ankoraŭ ĝis nun  
 nesuperita klimakso de la agnosko de  
 Esperanto fare de internaciaj institucioj.  
 Instruaj vortoj pri kiel oni defendas nian  
 aferon, kiel oni pledas, kiel oni informas  
 pri gravaj tutmondaj problemoj: el ili  
 oni povas profite ĉerpi solidajn argu-  
 mentadojn, efikajn frazojn, tre rafinitajn  
 vortojn, kvankam Lapenna uzis tute  
 simplan vortaron, facile kompreneblan  
 al ĉiu fininto de unuagrada lingvokurso.  
 Lia arto estis konstrui poezian enhavon  
 el simplaj vortoj kaj teni, per sia orator-  
 eco, la atenton de la publiko eĉ dum  
 sufiĉe longaj frazoj. La du paroladoj  
 aldonitaj en la nuna eldono, eldiritaj  
 inaŭgure en Helsinko (1969) kaj en  
 Vieno (1970), pritraktas la teknologian  
 antaŭensalton de la homo fronte al la  
 postrestinta soci-politika ordo: homoj  
 iras sur la lunon, sed ne kapablas inter-  
 kompreni kun la najbaroj.

Kompare kun la 120 paĝoj dediĉitaj  
 al la paroladoj, iel magre povas impresi  
 la ĉ. 50 dediĉitaj al la prelegoj. Ni  
 memoru, ke Lapenna prelegis ege abun-  
 de: en la Someraj Universitatoj, en la  
 Internaciaj Seminarioj de Germana  
 Esperanto-Junularo, en la Kulturaj  
 Ferioj en Grésillon; ĉie ajn kie li partoprenis  
 ion, li prelegis. Ofte pri juraj proble-  
 moj, sed, laŭ la aŭdantaro, ankaŭ pri  
 la movado, la strukturo de UEA, la gran-  
 deco de la kreinto de Esperanto. Plekt-  
 iĝas en tiuj prelegoj la fakulo kaj la  
 movadano, la rigora argumentado de la  
 profesoro kaj la entuziasmo de la fidela  
 adepto, la serioza sciencisto kaj la res-  
 pondeculo pri la antaŭenigo de Esperan-  
 to tra unueca asocia strukturo. La amp-  
 leksa prelego pri la grandeco de Zamen-  
 hof, fadeno de prelegaro de Lapenna  
 dum la Zamenhof-jaro (1959), povas  
 ankoraŭ nun esti utiligata kiel modelo de  
 sobereco, serioza dokumentado kaj ĝusta  
 kombino inter la rigardo al pasinteco kaj  
 aspiri al pli bona estonta komunikado.

Jen do libro kiu transpasas sian aĝon  
 kaj transdonas sian saĝon al la novaj  
 generacioj. Inter la diversaj celebradoj  
 kiuj memorigis Ivon Lapenna en la cen-  
 ta datreveno de lia naskiĝo en 1909, la  
 reeldono de ĉi tiu verko estas certe la  
 plej grava.

Carlo Minnaja



## Nun kleru kaj dancu

**Kaj Tiel Plu. *Surplacén venu vi.* —  
 Donneville: Vinilkosmo, 2009.**

La disko ekas per instrumentaĵo kun  
 unue enigma titolo *Nun oni povas scii  
 kaj pruvi.* Aŭdinte la unuajn taktojn de  
 ĉi bela melodio, mi tuj sensis, ke temas  
 pri trobadora kanto. Instigate al ĉi kara-  
 okeo, per esploro Vikipedia mi trovas la  
 daŭrigon *Dio bone rekompencas bonfa-  
 rintojn* — de la fama trobadoro Raimba-  
 ut de Vaqueiras vivinta turne de la 12-  
 13 jc. Mi malfermas la akompanantan  
 libreton kaj trovas tekstojn por ĉiuj tito-  
 loj en Esperanto kaj okcitana krom pliaj  
 originalaj fontolingvoj, klarigojn pri la  
 fontoj kaj la dancoj — mazurko, bureo,  
 rumbo, skotiŝo kaj aliaj, kaj bildojn  
 priajn. Kaj mi dronas en la vojaĝo.

Estas jam tria albumo ekde la banda  
 reaktiviĝo en 1998 — bona kleriga  
 vojaĝo kun plejparte danca muziko —  
 tradiciaj melodioj jen okcitana, jen kata-  
 luna, sefarda, kroata, kabila (ĉu multaj  
 el ni scias pri ĉi 11-miliona popolo dise-  
 loĝanta inter Kanariaj insuloj kaj la oaza  
 urbo Siwa en Egiptujo?), dana/sveda,  
 angla kaj aliaj. Multas soniloj: gitaro,  
 mandolino, kontrabaso, violono, flutoj,  
 gambovjolo, akordiono kaj kio ankoraŭ,  
 plus ĉiam bela ĥoro da bele sinkombi-  
 nantaj gevoĉoj aldone al la soloistaj.

Tre atente kaj diligente ellaboritas la  
 muzikaranĝoj — ĉiuj instrumentoj  
 sonas nature, ĝuste — ofte aŭdatas belaj  
 transiĝoj de unu parto al alia. La muzi-  
 kistoj lerte evitas monotonecon de takto  
 al takto, ilia plenumado igas vidi ilin  
 kvazaŭ koncerte. Cetere en ilia retejo  
 eblas trovi skemon pri ilia kutima dislo-  
 kiĝo dumplenuma.

Antaŭ jaroj mi vidis sporade trafintaj-  
 najn min video-pecojn kun KTP — kaj  
 notis por mi kiom aŭtente bele kaj stil-  
 ece ili plenumis muzikon. Ĉi nova albu-  
 mo ĉiom kaj abunde bunte konfirmas

tion. La endiska video montras band-  
 anojn muziki en sia muzikstudio, kaj  
 rakonti pri siaj sentoj, faroj, rilatoj al la  
 kreado kaj ĝenerale pri sia kunvivado.

Aŭskultante unu titolon post la alia,  
 mi sentas kaj aprezas la multjarcentan  
 tradicion kaj valoron de popolmuziko  
 kiu iam eble naive, eble simplece sed  
 transdonas la koron kaj animon de  
 homoj kun simplaj sed aŭtentaj vivĝoj  
 tra malfacilaĵoj: jen knabino kreskis je  
 strikta okulo de la panjo — kaj ripetas  
 ties sorton; jen sefarda rabeno zorgas pri  
 sia edzino; jen eternaj amkonfliktoj (“via  
 edzino misamatas, ŝin donu al mi...” —  
 kiomgrade tio eblis en ilia realo?).

Parto de la titoloj estas nur-instru-  
 mentaĵaj — unu, kun enigma literumo  
 UIAE — komponita de KTP mem,  
 sonas perfekte stilece laŭ la spirito kaj la  
 muzikenhavo de la albumo. Vi povas  
 kompari kiel oni dancas Svedie kaj  
 Angluje kun interŝanĝataj partneroj. Aŭ  
 lerni kiel kalkuli de naŭ ĝis unu, kantan-  
 te pri birdoj (iam en Sovetiaj E-tendaroj  
 kantatis “Dek boteloj pendas de la  
 mur”...). Kun intereso mi rimarkis unu  
 kanton soni alie ol tiu, kiun mi kredas  
 aŭdi iam. Kaj jen hipnota ritme kaj  
 melodie kabila kanto imagiga pri sever-  
 raj viroj en sekeco Sahara — mi plezure  
 konatiĝis kun la literoj de ties originala  
 lingvo.

Kaj tre konvinkas la morala forto de  
 la defendantoj de Madrido kontraŭ  
 faŝistoj en 1939 — la konkluda titolo.

La disko invitas pliajn serĉojn kaj  
 esplorojn — pri la dancoj, lokoj, manie-  
 roj. La aldonaj karaokeaj versioj instigas  
 kuni. Sendube la bando, kiu afable gast-  
 igas muzikistojn, ne perdas sian unik-  
 econ, brave sin perfektigas kaj serĉas  
 pliajn fontojn, havas longan vojon antaŭ  
 si plenan da kreado kaj similbrilaj ating-  
 ojn. Dankon al ili kaj ĉiuj kiuj klopodis  
 tion liveri al la internacia publiko.

Andrej Peĉonkin

## “Vinilkosmo” pretigas por vi



## Abunda fonto ne nur por Esperanto

*Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi / Red. Ilona Koutny. — Poznań: ProDruk; Steleto, 2009. — 407 p., il.*


István Szerdahelyi (1924–1987) estis elstara esperantologo kaj fondinto de la Esperanto-fako en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE). Li multe kontribuis por science trovi la lokon de Esperanto inter la lingvoj naturaj kaj planitaj, lingvistike esplori Esperanton kaj profesie trejni instruistojn kaj lingvistojn pri Esperanto.

La nuna memorlibro kolektas la kontribuojn el liaj disĉiploj kaj kolegoj en vasta senco por la 85-jara datreveno de lia naskiĝo. La volumo enhavas kelkajn valorajn fotojn kaj 50 kontribuojn kun variaj longecoj kaj temoj. Laŭteme, tiuj eseoj estas aranĝitaj en la sekvajn partojn:

- ♦ Prezento kaj rememoroj;
- ♦ Lingvoplanado kaj lingvopolitiko;
- ♦ De esperanta gramatiko al ĝenerala lingvistiko;
- ♦ Lingvopedagogio;
- ♦ Literaturo;
- ♦ Esperantaj leksikografio, movado kaj la cetero.

Ne eblas recenzi ĉiujn eseojn en tiu ĉi mallonga teksto. Do, mi nur mencias kelkajn el 50 kontribuoj, kiuj ĉefe apartenas al ĉi tri partoj: lingvoplanado, ĝenerala lingvistiko kaj lingvopedagogio. Per la parto “prezento kaj rememoroj”, la leganto povas bone koni profesoron Szerdahelyi el multaj flankoj. Tie ĉi ankaŭ troviĝas 27-paĝa bibliografio pri esperanto-agado de István Szerdahelyi. Ĝi estas grava fonto pri kaj por Szerdahelyi.

Barandovská-Frank traktas la temon pri praesperanto. La temo estas interesa, kvankam eble ne estas klare ĉu necese



enkonduki tiaĵojn en planlingvon. Sakaguchi enkondukas nekonatan planlingvon el Pollando: Paraglot, kiu estas aposteriora projekto. Schiller diskutas akcepton de Esperanto kaj la mondlingvo-problemo en la hungara (lingvistika) gazetaro ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo 19a/20a. La konkludo estas signifa ne nur por Hungario.

Wacha (Vaha) detale esploras vortokategoriojn en lingvopriskribo, planlingvoj kaj lingvoprojektoj. Blanke lokigas la germanan en la Eŭropa Unio. La eseo ankaŭ utilas al koni la ĝeneralan lingvosituacion de EU kaj kiel mezuri la gravecon de lingvoj. Gados listas la ŝancojn de Esperanto en la nuntempa mondo. Fakte, la artikolo ĉefe temas pri faktoroj, kiuj influas kaj eble influos la disvastigon kaj disvastiĝon de Esperanto.

Sub la titolo “Apud la vorteroj: la vortila kromvojo”, Dasgupta argumentas kiel PVM (Plenvorta Morfologio) analizas Esperanton. Duc Goninaz ligas Szerdahelyi al la teorio pri la “gramatika karaktero de la radikoj”. Li

konstatas, ĉiflanke, ke Szerdahelyi donis al ni la imitindan modelon de libera kaj sentabua teorio. En la artikolo “Sintaksa genro de esperantaj radikoj”, Rokicki prove respondas la demandon, kiel oni prezentas radikojn kapvorte. Alivorte: ĉu aŭ kiel esprimi la sintaksan karakteron de la radikoj en la vortaro? Post ekzameni morfemkombinaĵojn en Esperanto, Bujdosó konkludas ke la praktika potenco de la morfemkombinado ne estas tiom forta kiel Zamenhof sugestis, kaj ke la facileco de Esperanto devenas de ĝia reguleco. Simonnet diskutas la skriberojn de Esperanto. Katalin Horváth eseas pri polisemio, sinonimio kaj Esperanto. Kelkaj ekzemploj montras, ke tiuj fenomenoj ankaŭ ekzistas en Esperanto. Tio eble estas la rezulto de natura evoluo de Esperanto aŭ esenca aspekto de iu ajn vivanta lingvo. Waseda ekzamenas la esprimon de moviĝo en Esperanto, la hungara kaj japana lingvoj el la vidpunkto de kognativa lingvistiko. Kuznecov detale analizas la koncepton “Babel-turo” multflanke kaj konstatas, ke la Babela turo multe pli estas simbolo de lingvoscienco ĝenerale ol de interlingvistiko.

Barcsay prezentas la kulturen fonon de Esperanto en diversaj lernolibroj por junuloj kaj plenaĝuloj. Corsetti historie ekzamenas la lernofaciligan valoron de Esperanto. Kovács retrorrigardas lingvajn ekzamenojn pri Esperanto kaj ĝian ligan al Komuna Eŭropa Referenc-kadro. Kovács diskutas kiel oni moderne aliras malnovajn ideojn kaj rezultojn en Esperanta instruado. Gacond metodike analizas la personajn pronomojn en Esperanto. Jozefo Horváth enkondukas nin al la Pirata Metodo. Csiszár-Salomon esprimas dubojn kaj demandojn pri familia lingvouzo de Esperanto.

Hauptenthal respondas la demandon: kio estas kaj kial ni bezonas Historian Vortaron de Esperanto. Jozefo Horváth donas historion, principojn kaj horizonton de Esperanta-Hungara Meza Vortaro elektronika. Fine, la redaktoro de la libro, Ilona Koutny, fermas la volumon per la artikolo “Esperanta leksikografio en la epoko de komputiloj”.

La titolo diras la veron, ke la libro estas abunda fonto pri esperantologio kaj interlingvistiko. La libro estas en bona presado, kun kelkaj koloraj bildoj, tamen la stilo ne estas tute unuforma. Do, enhave ĝi estas riĉa, praktike ne estas facile trovi la bezonitajn erojn pro la manko de necesaj indeksiloj.

Liu Haitao

## Beletra Almanako



Literatura periodaĵo, lanĉita en septembro 2007, kun 140 ĝis 176 paĝoj. Aperas trifoje jare.

Redaktas Jorge Camacho (ĉefred.), Probal Daŝgupto kaj István Ertl.

Eldonas Ulrich Becker (Mondial, Novjorko).

Kun rubrikaj pri poezio, prozo, eseoj, debatoj, recenzoj, teatro. Laŭ interkonsento kun UEA, ĝi publikigas la verkojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj.

Mendu ĉe UEA aŭ informiĝu ĉe: [www.beletraalmanako.com](http://www.beletraalmanako.com)

## “La Ondo de Esperanto” en la jaro 2009

En la jaro de sia centjariĝo, *La Ondo de Esperanto* ricevis 543 abonkotojn. Ĉi tiom estas je 30 kotoj malpli ol en la rekorda jaro 2008. Proksimume la saman nombron da abonantoj nia magazino havis dum la jaroj 2005–2007.

	1998	1999	2000	2001	2002	2003	2004	2005	2006	2007	2008	2009
<b>Ruslando</b>	147	133	122	115	101	98	104	92	93	91	95	85
<b>Aliaj landoj</b>	136	170	238	257	305	407	421	450	452	448	478	458
<b>Entute</b>	283	303	360	372	406	505	525	542	545	539	573	543

En plej multaj landoj la abonantaro restis senŝanĝa aŭ malkresk(et)is, precipe en Ruslando (-10), Finnlando (-5), Italio, Litovio kaj Pollando (-4). La plej granda pasint-jara kresko estis en Serbio (+6). Entute, *La Ondo de Esperanto* dum 2009 estis legata en 50 landoj.

Jen landoj kun pli ol dek abonantoj (enkrampe estas la nombroj por 2008):

Ruslando . . . . .	85 (95)	Usono . . . . .	22 (25)
Pollando . . . . .	58 (62)	Italio . . . . .	21 (25)
Francio . . . . .	41 (41)	Serbio . . . . .	18 (12)
Germanio . . . . .	34 (32)	Svedio . . . . .	16 (18)
Brazilo . . . . .	26 (25)	Belgio . . . . .	15 (17)
Britio . . . . .	23 (24)	Danlando . . . . .	10 (11)
Finnlando . . . . .	23 (28)	Japanio . . . . .	10 (11)
Hispanio . . . . .	22 (22)	Svislando . . . . .	10 (9)

Dum la monda krizo ĉiuj vendoj (escepte de ĉiutagaĵoj) falas, precipe de varoj luksaj kaj “kulturaj”. Tiusence la 5,23-procenta falo de nia abonantaro ja estis neevitebla. Bedaŭrinde, la ricevataj abonlistoj atestas, ke la malkreskado daŭras ankaŭ ĉi-jare. Ĉu ni sukcesos denove havi pli ol 500 abonantojn? Ĉiu leganto povas helpi tion per reabono, informado en kluboj kaj renkontiĝoj, kaj per donaco al nia *Abonhelpa Fonduso*.

AIKo

## Ricevitaj libroj

*Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi* / Red. Ilona Koutny. — Poznań: ProDruk; Steleto, 2009. — 407 p., il. — [Recenzoekzemplero].

Lapenna, Ivo. *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* / Antaŭpar. Gaston Waringhien, Osmo Buller. — 2a eld., kompletigita. — Rotterdam: UEA, 2009. — 166 p. — [Recenzoekzemplero].

*Pasporta Servo 2010: La listo de gastigantoj de TEJO* / Komp. Alexandre Baudry. — Rotterdam: TEJO, 2010. — 210 p., il. — [Donaco de Halina Gorecka].

*Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo* / Red. Andrzej Grzębowski. — Bydgoszcz: Skonpress, 2009. — 16 p.; 5000 ekz. — [Donaco de ISTK].

van Dijk, Ziko. *Vikipedio por vi. Kiel ĝi funkcias, kiel vi kontribuas*. — Partizán-ske: Espero, 2008. — 64 p., il.; 1000 ekz. — [Donaco de Peter Baláž].

*Vojaĝo en Hirosima. Gvidlibro pri la urbo de monumentoj*. — Hirosima: Hirosima Esperanto-Centro, 2007. — 64 p.; il. — [Donaco de Hirosima Esperanto-Centro].

Варанкин, Владимир Валентинович. *Метрополитен* / Пер. с эсп. А.Александрова; Предисл. М.Бронштейна. — М.: Импэто, 2008. — 240 с.; 500 экз. — [Aĉeto].

Юзефович, Леонид. *Казароза*: [Роман]. — М.: Зебра Е, 2005. — 240 с.; 5000 экз. — [Aĉeto].

## Ricevitaj gazetoj

Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, 2009/3; Esperanto en Azio, 2010/66; Esperanto sub la Suda Kruco, 2009/100; Esperanto, 2010/1; Heroldo de Esperanto, 2009/16; Kataluna Esperantisto, 2009/351-352; Kontakto, 2009/5,6; La Ondo de Esperanto, 2010/2; La Revuo Orienta, 2009/12, 2010/1; La SAGo, 2010/ 61; Le Monde de l’espéranto, 2009/572; Literatura Foiro, 2009/242; Monato, 2010/1,2; Okazas, 2009/572; REGo, 2010/1; Spiritista Esperanto-Infomilo, 2009/137; Tempo, 2009/105; Usona Esperantisto, 2010/1; Verda Saksofono kaj Triskelo, 2009/5.

## Literatura Foiro, 2010, №242

En 2009 la Tago de la Esperanta Kulturo koincidis kun la 150a datreveno de la iniciatoro (kaj unua literatoro) de nia lingvo. Tio klarigas la specialan omaĝon al Lazaro Ludoviko Zamenhof en la numero 242, decembro 2009, de la revuo *Literatura Foiro*.

La evento estas vaste komentita, poezie kaj proze: de Malto, per versoj de Carmel Mallia, ĝis Pollando, per eseo de Walter Ŝelazny; de Francio, per filozofia gloso de Francisko Degoul, ĝis Litovio, per elzeviro de Valdo Banaitis; kun replonĝo al 1909, per artikolo de Hector Hodler okaze de la tiama ora jubileo.

Sed kultura revuo ne povas permesi al si personkulturon. Ĝi devas efektive kontribui al la prilumado de la bildo de Zamenhof, laŭ modernaj kaj sciencaj kriterioj. La samaj kriterioj estas aplikitaj en elstara eseo de Carlo Minnaja pri la fama juristo Ivo Lapenna, probable nia plej bona oratoro, kaj en krapojnta omaĝo de Giorgio Silfer al Reto Rossetti, verkisto kaj intelektulo “sui generis”: ili ambaŭ estus hodiaŭ centjaraj.

Tiu ĉi gusto por la retrospektivo karakterizas ankaŭ la paĝojn dediĉitajn al teatro, tra la historio de Studenta Esperanto-Klubo (drama sekcio en Zagrebo) fare de Zlatko Tišljar kaj Vanja Radovanović, kaj per la elvoko pri la graveco de teatro en la Velura Revolucio de 1989 en Prago, fare de Juraj Šebesta.

La interkontinenta astronomo Hans Michael Maitzen invitas “Rigardi la ĉielon por vidi la estonton” kaj fina paĝo gratulas kaj prezentas la novan prezidanton de PEN Internacia, John Ralston Saul.

La revuon *Literatura Foiro* posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Ĝi estas ankaŭ la organo de Esperanta PEN-Centro kaj parolilo de la Lingva Komitato de Esperanta Civito. Ĉefredaktoro: Ljubomir Trifonĉovski.

HeKo



Por la januara *Sudoku* venis 14 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Anne George, Malcolm Jones (Britio), Jindřich Tomášek, (Ĉeĥio), Erkki Kemppainen, Asko Kytta, Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Guy Tatet (Francio), Edeltraut Henning (Germanio), Gianfranco Vignando (Italio), Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Igorj Ivanov (Ruslando). La loto donis libropremion al **Gianfranco Vignando**. Ni gratulas lin!

L  
A  
S  
O  
L  
V  
O

8	1	7	6	4	2	3	9	5
2	9	4	3	5	1	7	6	8
3	6	5	8	9	7	2	1	4
9	5	2	4	6	8	1	3	7
4	8	6	1	7	3	9	5	2
7	3	1	5	2	9	8	4	6
5	2	8	9	3	6	4	7	1
6	7	3	2	1	4	5	8	9
1	4	9	7	8	5	6	2	3

## Vintraĵ Olimpikoj

Trovu vortojn ligitajn kun la vintraĵ sportoj. La vortoj (sen la finaĵo -o) estas en vertikalaj kaj horizontalaj linioj, oni povas legi ilin en ajna direkto (supren-malsupren, dekstren-maldekstren). La solvon sendu al la redakcio rete aŭ poŝte antaŭ la 10a de aprilo 2010.

Kompilis **Aleksej Korĵenkov**

R	I	N	A	I	T	S	I	R	K	B
T	L	I	T	E	K	S	K	U	H	O
O	K	R	A	M	E	L	E	T	O	B
B	Ŝ	U	S	A	D	A	T	E	K	S
O	P	G	O	L	U	L	Z	U	E	L
G	O	L	F	V	I	O	E	R	G	E
A	I	J	K	A	Z	M	O	I	N	D
N	O	T	E	L	E	K	S	P	I	J
S	K	I	S	A	L	T	E	J	U	E
E	S	L	E	D	A	I	K	S	Ŝ	S

*Juda humuro*

## Ne mensogu!

Iun sabaton en la sinagogo la rabeno anoncis, ke la venontan sabaton li predikos pri la peko de mensogado. Li diris:

— Mi petas vin legi hejme ĝis tiam la 28an ĉapitron el la libro *Levidoj*.

Venis sabato. Post la matena preĝo, tuj antaŭ la prediko, la rabeno demandis la viran publikon:

— Kiu el vi legis hejme la 28an ĉapitron el *Levidoj*?

Ĉiuj manoj estis supren levitaj.

Ridetis la rabeno kaj diris:

— *Levidoj* havas nur 27 ĉapitrojn. Nun mi komencos paroli pri la peko de mensogado!

El la kolekto de **Josi Shemer**

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

*el la kolekto de reduktoro*

### Tro sincera ĉefministro

Nun Japanio devas plenumi kvin defiojn: <...> la kvara estas paco, ekspluatado kaj malriĉeco en la mondo. (*Hatojama Jukio: nova ĉefministro // Monato*, 2009, №12, p. 10; malkovris Hector Alòs i Font)

### Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali

... batalo kontraŭ rasismo kaj maltoleremo devas esti unu el la prioritatoj kontraŭ kiu ĉiuj esperantistoj devas batali. (Jakvo Schram. [*Jaro 2009: Niaj atingoj kaj fiaskoj*] // *La Ondo de Esperanto*, 2010, №2, p. 4)

### Adolesko, aŭ: La tot' homoze in familje

Posttagmeze la 15-an de decembro, la UEA-oficejo en Novjorko gastigis simpozion por festi la 15-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. (Scott Page. *Simpozio en Novjorko // Esperanto*, 2010, №2, p. 36)

### Verda koro vendata?

Dum la tuta jaro, okazas trafikaj kulturaj kaj sportaj eventoj <...> la organa foiro BiObernai... (retejo de la franca urbo Obernai, [www.obernai.fr/fr/Esperto-845.html](http://www.obernai.fr/fr/Esperto-845.html), stato 18 feb 2010)

### Finnugra fatalo

... tia estoneco kiel oni tradicie ĝin perceptas verŝajne ne ekzistos. (Andreas Künzli. *Ankaŭ Fettes fiasko*, 9 jan 2010, [www.liberafolio.org/2010/mark-fettes-volas-krei-novangvidorganon-por-uea/#1262998818](http://www.liberafolio.org/2010/mark-fettes-volas-krei-novangvidorganon-por-uea/#1262998818))

### Mekanike, sen perverso?

Ĉiuj rajtoj de la libro apartenas al la eldoneja de Grenader-Grupo. Nenian parton de la libro oni ne rajtao multoblige mekanike, elektronike aŭ je in alia maniero sen permeso de la firmao Grenader grupo. (Kristina Porgasaar. *Estonio. Lando, popolo, kulturo*. Tallinn, 2009, dorskovrilo; rimarkis Ionel Oneț)

### Manke de miraklo, beno suficôs

Viaj komentoj benvenas ankaŭ en la paĝara gastlibro... (Katalin Kovats, [www.liberafolio.org/2007/referenckadro-1/#1198157029](http://www.liberafolio.org/2007/referenckadro-1/#1198157029), 20 dec 2007; atentigis Nicola Ruggiero)

### Senatenta mesaĝo

Senatente atingis nin la terura mesaĝo ke nia kara Jörg Haider mortis je akcidento! Ni funebras! Jörg, ni neniam forgesos vin! ([www.ipernity.com/blog/attila.schimmer/99513](http://www.ipernity.com/blog/attila.schimmer/99513), 12 okt 2008)

### Kanibaloj en Aŭstrujo?

... ili neniam volis vorpeli eksterlandanojn [...] ili ja volas vorpeli KRIMULAJN eksterlandanojn. (Samloke)

Plukis **István Ertl**





## Donacoj en 2009

### Abonhelpa fondaĵo

Anonima (Francio) . . . . .	114.00 EUR
Gerd Bernhard (Germanio) . . . . .	12.00 EUR
Sergej Bronov (Ruslando) . . . . .	2790.00 RUR
Osmo Buller (Nederlando) . . . . .	162.00 EUR
Nora Caragea (Germanio) . . . . .	20.00 EUR
István Ertl (Luksemburgio) . . . . .	20.00 EUR
Jos. Koch (Svislando) . . . . .	28.00 EUR
Munkena EK (Germanio) . . . . .	62.00 EUR
<i>Entute, dum 2009</i> . . . . .	<i>488.00 EUR</i>
Danke al la Abonhelpa fondaĵo 18 esperantistoj el 14 landoj en 2009 ricevis <i>La Ondon</i> .	

### Fondaĵo Amiko

Anonima (Francio) . . . . .	200.00 EUR
Carlos Enrique Artime (Hispanio) . . . . .	8.00 EUR
Sergej Bronov (Ruslando) . . . . .	4000.00 RUR
M. Cramer . . . . .	20.00 EUR
Douglas Draper (Norvegio) . . . . .	40.00 EUR
Tatjana Kulakova (Ruslando) . . . . .	3500.00 RUR
Pedro Zurita (Hispanio) . . . . .	8.00 EUR
<i>Entute, dum 2009</i> . . . . .	<i>456.00 EUR</i>

### Fondaĵo Ilaro

Anonima (Francio) . . . . .	186.00 EUR
<i>Entute, dum 2009</i> . . . . .	<i>186.00 EUR</i>
Kasraporto	
En la kaso je 31 dec 2008 . . . . .	961.00 EUR
Donacoj dum 2009 . . . . .	186.00 EUR
Aĉetoj en 2009 . . . . .	-867.00 EUR
<i>En la kaso je 31 dec 2009</i> . . . . .	<i>280.00 EUR</i>

Danke al *Ilaro* ni aĉetis novan pli potencon komputilon. Donaĉojn bonvolu sendi al nia UEA-konto avko-u, aŭ al vialanda peranto de *La Ondo*. Eĉ plej etaj sumoj estas bonvenaj.

*Koran dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj!*

**Halina Gorecka**



**Finlando.** Komence de la jaro en la ĉefbiblioteko de Turku ekfunkciis ekspozicio pri Esperanto (vd. p. 10). La malfermon ĉeestis lokaj esperantistoj, fotitaj antaŭ la tabulo pri kongresoj: Väinö Havu, Merja Uotila, Tiina Oittinen, Osmo Kaplas kaj Jukka Nikoskelainen. (Fotis oficistino de la biblioteko)



**Hispanio.** La Zamenhofa Tago en Valencio okazis pli malfrue ol en aliaj urboj. La antaŭlastan tagon de januaro lokaj esperantistoj per prelegoj kaj komputilaj prezentadoj omaĝis al la iniciatoro de Esperanto; fine post *La Espero* kaj grupfotado ili iris al restoracio por gaja bankedo. (Augusto Casquero)



**Germanio.** Entuziasmaj lernemuloj pasigis bonetosan semajnfinojn (12-14 feb 2010) en la Esperanto-urbo Herzberg. Dum la intensa kurso ili evoluigis siajn lingvokonjn kun helpo de la kursgvidantoj Petro kaj Zsófia. Ne mankis amuzoj kaj urborigardado kun vizito de la nova Zamenhofa monumento. (ICH)

# HISTORIO

## DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*  
Serio *Scio*, Volumo 5  
128 paĝoj, 12 eŭroj

# *Mi estas homo*



Originalaj verkoj de  
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*  
Serio *Scio*, Volumo 6  
288 paĝoj, 24 eŭroj

# HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj  
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*  
Serio *Scio*, Volumo 8  
320 paĝoj, 27 eŭroj

*Aleksander Korĵenkov*



## ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*  
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5  
16 paĝoj, 3 eŭroj

*Mendu en via kutima libroservo*